

Oficiala Organo
de la internacia
**VEGETARA LIGO
ESPERANTISTA**
(V. L. E.)

VEGETARANO

Oficiala Organo
de la
**INTERNACIA
VEGETARA UNIO**
(I. V. U.)

Adreso: Oscar Bünemann, Hamburgo 24, Papenhuderstr. 32, II, Germanujo.

Landaj sekretarioj kaj abonprezo en nacia mono:

Argentino (Pes. pap. 2.—): S-ro Graciano Garcia, Rioja 814, Buenos Aires.

Belgujo (B 4.—): S-no Yvonne Colijn, Jan Borlé-str. 8, rue Jean Borlé, Bruxelles-Auderghem.

Bulgarujo (Levoj 50.—): S-ro Petr Mitkov, Boulevard Evlogi Georgiev 49, Sofio.

Ceĥoslovakujo (kĉ. 25.—): S-ro Emil Mai, Mühlfeldgasse 11, Gablonz a. N.

Danujo (dkr. 3.—): F-no Margrethe Noll, Fredericiagade 6, II., Kopenhago-K.

Estonujo (Ekr. 3.—) F-no Helmi Dresen, postkast 6, Talino.

Francujo (ifr. 20.—): F-no Cécile Royer, 14 Rue des Carmes, Parizo V, poŝtkonto Parizo 25 777.

Germanujo (Rm. 3.—): La redaktanto, poŝtkonto Hamburgo 31 883.

Grandbritujo (ŝ. 3/—): S-no Margaret Blaise, „Bonveno“, Manor Way, Headstone Lane, Harrow apud Londono.

Ĉi la landoj necititaj oni sendu rekte al la redaktanto la egalvaloron de 4 svisaj frankoj. La kuponoj de UEA estas akceptataj kaj estu uzataj prefere ol nacia mono. Ne pagu per poŝtmandatoj; ĉar ili kaŭzas kurzan perdon. Anoncoj pri vegetaraj manĝejoj kostas la egalvaloron de dek svisaj frankoj.

Hungarujo (P. 4.—): S-ro Bihari Mór, ĉe Szerderit, Telep-u. 14, Budapeŝto VII.

Latvuj (Latoj 4.—): S-ro Edgardo Grots, Elizabetes ielâ 9, dz. 33, Rigo.

Litovujo (Lid. 8.—): S-ro Vladas Butkus, Prezidento gatvė 2, II-ji gimnazija, Kaŭno.

Nederlando (fl. 2.—): S-no Catharina J. Roskes-Dirksen, Anemoonstraat 96, Hago.

Polujo (zl. 8.—): S-ro Chajm Kusnir, Ul. Orwida 5, Wolomin powiat Radzysiminski.

Sovjetunio (R. 1.50): U. U. Zajcev, B. Zelenovskaja 23, Podolsk, Moskovskoj Gubernii.

Svedujo (skr. 3.—): S-ro Erik Brenander, Fyrunga.

Svisujo (sfr. 3.—): S-ro Paul Enz, Nuxowerk, Rapperswil, (St. Gallen).

Usono (dol. 1.—): S-ro Karl Fröding, 604, Seventh Street, Rockford, Illinois.

La VEGETARA LIGO ESPERANTISTA (V. L. E.) estis fondata en la jaro 1908-a, dum la Dresena Universala Kongreso de Esperanto. Ĝia organo, la „Vegetarano“ estis fondata en la jaro 1914-a. La kotizo por VLE kaj la abonpago por la „Vegetarano“ estas identaj.

La celo de VLE estas, disvastigi Esperanton inter la Vegetaranoj kaj Vegetarismon inter la Esperantistoj. Krome, danke al nia internacia helpa lingvo, ĝi volas helpi kaj antaŭenpuŝi la internacian vegetaran movadon kaj la solidarecon inter vegetaranoj de ĉiuj landoj pli efike, ol tion povus fari naciaj organizoj aŭ revuoj.

Fine, nia ligo volas kunigi aron da homoj, kiuj interkonsente kompletas kontraŭ ĉio malbona kaj kiuj subtenas interne je la Esperanta movado la etikan nivelon de nia komuna volo.

La ĝenerala sekretario kaj kasisto de VLE estas nune Oscar Bünemann, Hamburgo 24, Papenhuderstr. 32, II., Germanujo. Landaj sekretarioj prizorgas informojn, enkasigas kotizojn, propagandas kaj tradukas, se oportune, artikolojn el nia organo por naciaj parenccelaj eldonaĵoj.

KONGRESOJ.

Ĉi tiu numero devas raporti pri du kongresoj, kaj pro tio, ke ni devis atendi la raportojn pri ambaŭ kongresoj kaj prilabori ilin, la apero de nia buteno denove malfruiĝis.

Pri la internacia vegetara kongreso de la I. V. U. la aparta rubriko de tiu organizo en nia buteno enhavas informojn. Tamen ĉi tie estu aldonata tio, kio rezultas el la raporto de gesamideanoj Yelland kaj kio eble interesos la esperantistojn speciale. Geedzoj Yelland ĉeestis la kongreson en Steinschönau (Kam. Ŝenov) kiel oficialaj delegitoj de la Londona Esperanta Vegetara Societo, kies animo estas nia samideanino kaj VLE-anino Hilda Lane. Ili loĝis dum la kongreso ĉe la vicurbestro, s-ro Karl Lorenz.

Geedzoj Y. veturis bicikle al Steinschönau el la hungara urbo Gyöngyös. Steinschönau kun siaj okmil loĝantoj estis feste ornamita per naciaj, esperantistaj kaj diverskoloraj standardoj. La urba konsilantaro kune kun la industriistoj de la vitra industrio, la sola grava industrio tie, faris ĉiujn arangojn por la kongreso. La delegitoj, proksimume 32 el 16 landoj, estis la gastoj de la urbo. Ankaŭ la aliaj kongresanoj nenion pagis por la loĝado. Ĉiuj delegitoj ankaŭ manĝis senpage, en la Hotelo Merkantile, la plej granda en la urbo.

La prezentita bilanco de la I. V. U., preparita ankoraŭ de la mortinta D-ro Nolthenius, nia samideano, estis presita nur en Esperanto. La ĝisnuna sekretario Egerod donis klarigojn pri ĝi en germana lingvo. D-ro Walsh el Londono diris, ke li nenion komprenas, kaj postulis klarigojn en angla lingvo. Samideano Yelland resumigis anglalingve. Tuj delegito el Bulgarujo leviĝis dirante, ke li kaj aliaj komprenas nek germane, nek angle, kaj postulis klarigojn en Esperanto, kiujn donis fiam samideano Y. Ankaŭ dum la sekvintaj diskutoj s-ro Yelland tradukis Esperanten.

Bulgara delegito invitis la sekvontan kongreson al Bulgarujo; sed s-ro Egerod kaj aliaj tuj vidis la lingvan malfacilecon kaj postulis, ke la kongreso okazu prefere en Germanujo (ĉar ili komprenas germane kaj angle). Jen la graveco de la lingva demando kaj la necesegeco de Esperanto! Stutgarto estis elektata kiel kongresurbo 1932.

En la hotelo Merkantile okazis grandioza bankedo. Multaj paroladoj estis farataj en diversaj lingvoj kaj tradukataj germanen; ankaŭ en Esperanto okazis paroladetoj. Dum la kongreso mem kvar paroladoj okazis en germana lingvo, unu en angla kaj unu en Esperanto.

La ĝisnuna sekretario kaj nuna kasisto de la I. V. U.,

s-ro Oluf Egerod, konas Esperanton, sed ankoraŭ ne regas flue la lingvon. S-ro Feix, la nova sekretario, jam komencis lerni Esperanton, kaj al ambaŭ, kasisto kaj sekretario, oni jam nun povas skribi en nia lingvo.

Nederlanda delegito, samideano van Borrendam el Voorburg apud Hago, diris, ke la Nederlanda Vegetara Ligo enketis inter la partoprenintoj de la Olimpaj Ludoj 1928, por eltrovi, kiom da vegetaranoj konkuris. Li citis la nomojn de tri vegetaranoj-ĉampionoj: Nurmi, El Ouai kaj Van Klaveren. Laŭ 70 respondoj el 16 landoj, 47 ne fumas kaj 42 estas abstinuloj. (Hazarde la redaktanto konas ankoraŭ unu partoprenintan vegetarano, la hollandon Landher. Ŝajnas, ke tiaj enketoj, same kiel la provoj de Esperantista statistiko, ĝenerale ne havas kontentigan rezulton; ĉar pro inerteo aŭ indiferenteco multaj ne respondas, kaj malprofite al la enketantoj la rezulto montras tro malaltan nombron. Dum la veg. kongreso, aŭstra samcelano jam diris, ke multaj sportuloj rigardas sian dieton kiel profesion sekreton kaj jam pro tio ne konfesos ĝin. La red.)

Tre instrua por la kongresanoj kaj vere impona estis la vizito al la vitro-industrio de Steinschönau. En la plej granda fabriko, de s-ro Palme, oni vidis la faradon de glasoj, vazoj kaj aliaj objektoj el vitro. Oni vidis la fabrikojn de lustroj, la plej grandan en la mondo, kaj ankaŭ la Urban Muzeon, kie estas kolektitaj valoraj vitraj objektoj. En la urba faklernejo la direktoroj montris al la kongresanoj la gravuradon. Tio estas malfacila laboro kaj postulas artistan talenton.

Merkredon vespere, en la hotelo Merkantile, okazis la Esperanto-vespero, aranĝita de s-ro Otto Kittel, sub prezido de Prof. D-ro Rudolf Hiekel el Leitmeritz. Ĉeestis pli ol 350 personoj, el kiuj almenaŭ cent estis samideanoj el la proksimaj urbetoj kaj vilaĝoj. La ĉambrego estis plenplena. Diverslandaj samideanoj faris paroladetojn, kiuj estis lerte tradukataj de samideano Benno Bräuer el Langenau. D-ro A. Sommer-Batjek el Prago prelegis en Esperanto pri „Vegetarismo kaj la ĉiutaga vivo“ (vidu represon en alia parto de nia bulteno). La parolado ne estis tradukata. Granda aplaŭdo. Ankaŭ s-ro Oluf Egerod, kiu komprenas Esperanton, kaj aliaj oficistoj de la I. V. U. parolis kaj esprimis dankojn al la urbaj aŭtoritatoj, al la aranĝintoj de la kongreso ktp. Ĉio estis tradukata nur en Esperanton. Tiamaniere la Esperantistoj montris, kiel internacia kongreso devus esti gvidata. Nun s-ro Dürr, la prezidanto de la kongreso prenis la parolon, dirante: „Mi dankas la esperantistojn pro la bonege aranĝita vespero kaj pro ilia laboro dum la kongreso. Mi alte taksas la Esperantomovadon kaj nun bone komprenas ĝian rolon. Kvankam mi estas 73-jara, mi publike deklaras, ke de nun mi lernos Esperanton, por praktike uzi ĝin ĉe nia venonta kongreso. Ni bezonas Esperanton, ĉar ankaŭ ĝi estas movado idealista.“

Sekvis kantoj, deklamoj en Esperanto. Dek-kvar fraŭlinoj el Steinschönau prezentis belan dancon sim-bolan „Pomfloro kaj la Verda Stelo“. F-ino Kühnel kantis la „Esperantujan Kanton“ verkitan de nia samideano Roskes-Dirksen kaj komponitan de nia ĵus mortinta D-ro Hugo Nolthenius, kiu intencis mem muzike akompani la kantistinojn.

S-ro E. E. Yelland preparis rezolucion metotan antaŭ la kongreson, ke en estontaj kongresoj ĉiu faru paroladon en sia nacia lingvo kaj la sola traduka lingvo estu nur Esperanto. Tiu propono estis subskribita de pli ol tri-

dek esperantistoj, kaj la sekretario laŭtlegis ĝin al la ĉeestantoj. La ĉeestantaro ŝajnis simpatia al la propono; sed evidente la estraro preferis, ke — kiel Egerod diris — „la lingvo de la kongreso estu la lingvo de la lando, kie la kongreso okazas, kaj laŭ la nuna regularo ni ne povas akcepti la proponon“. Yelland proponis ŝanĝon de la paragrafoj, por ebligi tion. La nederlanda delegito, samideano van Borrendam, eĉ proponis, ke oni uzu nur Esperanton. La esperantistoj interkonsiliĝis kaj decidis, ne obstini pri la propono, kvankam la plimulto estis favora. La ĉeestantaro eĉ laŭte aprobis la proponon. Dum la Esperantovespero montriĝis, ke la estraranoj efektive subtenas nin. Delegito Hough el Manchester eĉ promesis, lerni sufiĉe da Esperanto, por praktike uzadi ĝin dum la sekvonta kongreso.

Ĉiu, kiu ĉeestis la kunsidojn, vidis la bezonon de internacia lingvo kaj aprobis Esperanton. Certe la kongreso faris grandan propagandon por Esperanto; ĉar la publiko interesiĝis, kaj multaj delegitoj kaj aliaj diris, ke ili nepre lernos Esperanton.

Samideano Yelland, en sia raporto, diras, ke per la rekta aliĝo al la I. V. U. kaj per la sendo de du delegitoj la Londona Esperanta Vegetara Ligo jam bone montris la vojon, por progresigi nian lingvon. Krom la VLE-delegito, samideano Mai, Nederlando, Norvegujo, Danujo kaj Bulgarujo jam sendis delegitojn, kiuj estas esperantistoj aŭ almenaŭ jam eklernis Esperanton. —

La kongreso finiĝis per ekskurso aŭtomobila ĝis Bodenbach (Podmokly), de kie oni ŝipe sur la Elbo veturis al Salesel. De la monto tie oni ĝuis belegan panoramon super la serpentumanta rivero Elbo. La ekskurso estis senpaga, kaj estis donataj du bonegaj manĝoj.

La kongresanoj multe ĝuis la kongreson kaj kun dankemo al la lertaj organizintoj kaj la gastema urbo ili forlasis Steinschönau.

Kaj nun la dua kongreso. Pri ĝi la bulteno de la Budapeŝta kongreso raportis:

La **Vegetaranoj** kunvenis jaŭde (8. 8.) je la 16-a horo en la Scienca Universitato. La kunvenon partoprenis ankaŭ la prezidanto de la Hungara Vegetarana Societo, s-ro Bicsérdy. La celo de la Vegetara Ligo Esperantista estas disvastigi la ideon de vegetarismo inter la esperantistaro kaj propagandi Esperanton inter la vegetaranoj. Ĉe la fino parolis Georgo Tóth el la hungara urbo Nagykanizsa (parolu nodĵkonija) pri la Bicerdismo.

Nian fakan kunsidon ĉeestis 26 personoj. Multaj interesuloj kaj vegetaranoj, malgraŭ antaŭa promeso, ne venis; ĉar ili rigardis vidindaĵojn de la urbo aŭ ĉeestis aliajn fakajn kunsidojn. La malfrua veno de la plej multaj kaj la troa mallongeco de la tempo estis tre ĝena, kaj por estontaj dumkongresaj fakkunsidoj ni devas pli multe atenti tiujn punktojn.

S-ino Theresa Yelland per kelkaj enkondukaj diroj malfermis la kunsidon kaj proponis, ke samideano Emil Mai kaj s-ro Bicsérdy, la konata prezidanto de la Hung. Veg. Soc., estru la kunsidon. S-ro E. E. Yelland estis proponata kiel sekretario. Akceptita.

Oni laŭtlegis salutleteron de Oscar Bünemann. F-ino Annie Firth el Huddersfield, Anglujo, salutis oficiale en la nomo de la Societo por Saneca Vivo de Huddersfield kaj Distrikto (The Huddersfield and District Healthy Life Society), kaj s-ro Petro G. Pamporov el Sofio (Bulgarujo, strato Oborištë 24) salutis en la nomo de la Bul-

garioj. Pro manko de tempo ne estis eble, ke ĉiu salutu la kunvenintojn.

S-ro Yelland mallonge raportis pri la Sepa Internacia Vegetara Kongreso en Steinschönau. S-ro Emil Mai disdonis ekzemplerojn de „Vegetarano“ kaj laŭtlegis al la publiko la diron de la redaktanto, ke „kiel parencajn movadojn li konsideras en nia bulteno la batalon kontraŭ vivisekado, kontraŭ vakcinado, kontraŭ tabako, kontraŭ alkoholo, kontraŭ bovbataloj kaj ĉiaj similaj besturmentoj kaj precipe la radikalan pacifismon“. Sekvis diskuto, en kiu pluraj samideanoj esprimis la opinion, ke en si mem vegetarismo ne estas parto de tiuj movadoj, kiuj havas apartajn organizojn, por forigi tiajn malbonojn, sed ke samtempe ni konsentas kaj kunsentas kun tiuj movadoj kaj helpas ilin ĉiel. Neniu esprimis opinion, ke artikoloj traktantaj tiujn movadojn, ne aperu en nia bulteno.

D-ro Stefan Joó el Debrecen (Hung.) parolis pri la vivo de nia samideano, la mortinta vegetarano-esperantisto D-ro Rudolfo Rajci, kiu multe laboris por vegetarismo kaj Esperanto kaj estis ĝenerala sekretario de nia VLE antaŭ la milito. S-ino Yelland parolis pri nia mortinta samideano D-ro Hugo Nolthenius, kiu faris multon por ambaŭ movadoj. La ĉeestantoj silente ekstaris por ilia honoro kaj memoro.

Ĉar la venonta internacia vegetara kongreso okazos nur post tri jaroj, estis proponate al nevegetaranoj, kiuj emas al vegetara ideo, ke ili legu nian literaturon kaj fariĝu vegetaranoj. Tio ebligas starigon de Esperantistaj landaj vegetaraj societoj, kiuj povos sendi al la venonta internacia kongreso siajn delegitojn. Tiel nia lingvo triumfos ĉe la internaciaj veg. kongresoj.

Ĉe la fino S-ro Georgo Tóth el Nagykanizsa legis traktajon pri „biĉerdismo“.

Pri la ĝenerala Budapeŝta kongreso ni ne raportas ĉi tie; ĉar tio estas tasko de la ĝeneralaj Esperantaj revuoj.

Alkoholo.

Alkoholo kreas artifiĉan feliĉon, artifiĉan kuraĝon, artifiĉan gajecon, artifiĉan memkontentecon, farante tiel la vivon tolerebla por milionoj da homoj, kiuj sen ĝi estus nekapablaj toleri sian situon. Por ili la alkoholo estas beno. Malfeliĉe pro tio, ke ĝi agas per la detruo de konscienco, memregado kaj la normalaj korpunkcioj, ĝi kreas krimon, malsanon kaj malnobliĝon laŭ tia grado, ke la fabrikado kaj vendado de alkoholo estas nun malpermesitaj en tuta Usono, kaj ekzistas forta movado, por enkonduki la saman malpermeson en Grandbritujo.

George Bernard Shaw (Socialismo kaj Libereco).

La vegetarismo kiel unua ŝtupo de la spirita vivo.

(Ni publikigas ĉi tie la resumajon el la parolado de nia samideano Petro Pamporov, Bulgarujo, faritan de samideano D-ro Hiekel. Kiam ni havos pli da spaco, la plena parolado aperos sub tekstoj de la I. V. U.)

La Esperanta raporto de la bulgara delegito, Prof. Petro G. Pamporov, kie la vegetara movado havas klare filozofan-religian karakteron (ĉe ni sciencan!), ne povis esti tradukata germanen pro manko de tempo. Pro tio ĝi restus nekonata de ĉiuj, kiuj ne komprenas Esperanton. Sed, por kritika trarigardo de la vegetara movado, precipe ĉi tiu parolado estas grava. Tial estus bone, se

Hugo Nolthenius.

La 8-an de junio ni kun multe da bedaŭro eksciis pri la morto de nia samideano kaj samcelano, D-ro Hugo Nolthenius. Li atingis la aĝon de okdek jaroj. En Nederlando li estis tre konata persono.

Kvankam li estis profesoro ĉe gimnazio, li trovis la tempon, por ludi gravan rolon en la muzika mondo kaj en la vegetara kaj paca movadoj.

Ĝis sia morto li estis kasisto de la Internacia Vegetara Unio, kaj dum multaj jaroj li estis prezidanto de la Nederlanda Vegetara Ligo. Kiam li havis jam sepdekkvin jarojn, li ekstudis esperanton kaj komponis tiam la Internacian Vegetaran Kanton. Ankaŭ la Nederlanda Vegetara Kanto, kiu estas tradukita en plurajn lingvojn, ankaŭ en esperanton, estas lia komponaĵo.

Li intencis ĉeesti la internacian vegetaran kongreson en Steinschönau; sed, ho ve, tiun kongreson li ne ĝisvivis.

Diversaj movadoj sentos profundan doloron pro la perdo de eminenta, laborema, entuziasma membro. Al lia edzino iras niaj korsentataj kondolencoj.

Li ĉiam restu en nia memoro, kaj lia ekzemplo instigu nin, por senlace daŭrigi nian agadon por la belo kaj bono.

C. J. Roskes-Dirksen.

oni tradukus nacilingven la jenan resumajon de la pli ornamita originalo.

La homo estas kvazaŭ viva sunradio, radio de Dio. Dio estas lia patro. Ĉiu homo estas filo de Dio. En la homo Dio volas ekbrili, kiel la suno en la kristalo. Kaj Dio estas la amo. Evoluadi al harmonio kun ĉi tiu senlima amo, estas la senco de la homo vivo. (Tio estas la filozofio de Kristo, la evangelio de Johano!)

Nutro de la homoj estu tial suna kaj dia por korpo kaj animo:

- I. Viva planta nutro (fruktoj, semoj laŭ Moseo I. ĉap. 1, v. 29—30), aero kaj lumo, por la korpo.
- II. Vera scio por la menso.
- III. Belaj sentoj por la koro,
- IV. Noblaj, amplenaj agoj por la volo.

Nur, se la homo trairas ĉiujn kvar ŝtupojn, ekzistos plena sano korpa kaj anima: harmonio en si kaj kun la Dieco.

La unua ŝtupo, la vegetarismo, estas la nepre necesa, ne preterlasebla plej suba ŝtupo. La homoj hodiaŭ volas pretersalti ĝin kaj venas per tio en malharmonion kun si kaj kun Dio. (Infero sur tero!) Tial la nekonto kaj la soifo je narkoto ĉiaspeca: manĝemo, drinkemo, fumemo, plezuremo, seksa voluptemo.

La sanktaj skriboj de ĉiuj popoloj rekomendas tial la vegetarismon, kaj la legendo pri la pekalo de la unuaj homoj (laŭ la biblio, ekzemple) estas vera ankoraŭ hodiaŭ: La manĝo el la „arbo de la vivo“ (kiu staras en la mezo de la paradizo, t. e. la bestaro kaj la homaro!), de la viandmanĝado, estas la unua malharmonio, kiun sekvas

ĉiuj aliaj. La harmonio en si kaj kun Dio, tio estas la paradizo (la ĉielo en ni!), estas perdita. Maldolĉan ekscion alportas la ĝuo el la malpermesita arbo. Oni scias tiam, ke oni pekis kontraŭ la amo (kontraŭ Dio!). Tial la dua nomo: „arbo de l' ekscio“.

En la estanta tempo nun anoncas sin nova epoko. La modernaj reformceladoj: turismo kaj „Wandervögel“ (pasbirdoj, t. e. homoj, kiuj trairas la landojn ĝoje kun naturĝuo), gimnastiko, sporto, abstinemovado, la movadoj por gardi la bestojn kaj homojn (pacifismo ktp.), ĉiuj unuigaj celadoj (socialismo, esperantismo kaj ankaŭ la ekonomiaj!) rekondukos la popolojn al la harmonio kun la naturo kaj fine kun Dio. Ĉi tiuj celadoj ankoraŭ ne estas kunigitaj. Sed la vegetarismo kunigos ilin.

Kaj tiel venos Nova Kulturo, renesanco en ĉiuj fakoj, dum kiu oni ne plu pekos kontraŭ Dio, kiu estas la amo, per buĉado, milito, ekzekuta mortigo ktp. Amo estas la plej alta leĝo, kaj ĝia plenumo precipe ekfloros nur post renesanco de ĉiuj konfesioj, kiam ili konsekvence ĉie kaj ĉiam servos al la sole vera religio, al la religio de la amo. Ĉar ja la klarega saluto de Kristo kaj de la prakristanoj (vegetare vivintaj!) estis: „La paco estu kun vi!“ (ĉie kaj ĉiam!).

La parolanto ankoraŭ citis, ke en Bulgarujo, kie la oriento tuŝas la okcidenton, precipe fortaj impulsoj komencis la renesanco de la kristanaj konfesioj (Pop Bogomil, la Bohemaj kaj Moravaj Fratuloj!) kaj ankoraŭ nuntempe efikadas: la Blankaj Fratoj. Ili etendas la manojn al ĉiuj same direktitaj — se ankaŭ ne same pensantaj — homfratuloj por komuna kulturlaboro.

Rimarko de R. H.: Apud Steinschönau ekzistas en la arbaroj antikva altaro nomita „Altaro de l' Fratoj“.

Komence de kiu aĝo infanoj povas manĝi viandon?

Tio estas la titolo de artikolo „por la praktikuloj“ en la Internacia Medicina Revuo (cetere bonega fakrevuo en Esperanto, laŭdinda jam pro la faka vortaro, kiun ĝi ĉiam enhavas). Oni donas respondojn de pluraj francaj medicinistoj, interalie de Prof. D-ro Charles Richet, kiu diras: nekuirita viando 20 monatoj, kuiritaj 24 monatoj.

Strange estas, ke oni tute ignoras la opinion de vegetaraj kuracistoj, kiuj opinias, ke neniam oni donu al infano viandon kaj ke prefere neniu manĝu viandon. Jam en nevegetaraj rondoj oni ĝenerale estas nun konscia pri tio, ke oni ne donu viandon al malgrandaj infanoj, kaj ĉiu iom vivsperta persono jam scias ion pri la malbonaj ecoj de viandnutraĵo.

Sed, kio estas plej stranga, tio estas la demando mem. Ĉu oni do ne povas atendi la momenton, por igi la infanon partopreni en la abomenaĵoj, pri kiuj ĉiu viandmanĝanta persono, kvankam li aŭ ŝi evitas propraokule vidi ilin aŭ propramense pripensi ilin, estas respondeca? Fakte, laŭ tiu ekzemplo oni povus fari aliajn demandojn tute similajn, ekzemple: Kiam oni povas instrui al infano glorkanti pri sia popolo kaj malglorkanti pri aliaj popoloj? Aŭ: kiam oni povas meti pafilojn en la manojn de infano? Aŭ: kiam oni povas meti cigaredon en la buŝon de infano?

Ĉiuj tiuj demandoj enhavas la deziron, alkitinigi la junan generacion laŭeble plej frue al la hontindaj kutimoj de la plenkreskuloj, zorgi por tio, ke ili ne estu esceptoj en la ĝenerala socio, ke ili ne pensu kaj sentu mem, sed sekvu la ĝeneralan vojon.

Konsolo estas, ke la lasta konkludo el la respondoj ricevita estas: „Ni konkludas, ke la kuiritaj viando ne estas utila kaj povas esti malutila al tre junaj infanoj kaj ke plej ofte la lakto-ovo-vegeta dieto sufiĉas ĝis du kaj duona aŭ tri jaroj“. Laŭ tiu konkludo ni, vegetaranoj, restas ĉiam tre junaj, maksimume trijaraj. La naivuloj eble ne scias, ke al tre multaj personoj la lakto-ovo-vegeta dieto „sufiĉas“ ankaŭ en pli alta ol trijara aĝo, ekzemple G. B. Shaw, kiu la 26. 7. 29 fariĝis 73-jara, estas vegetarano de la jaro 1880-a, kaj dum tiuj 49 jaroj „sufiĉis“ al li la sendianda nutraĵo.

La scienco kaj la scienculoj estas vere admirindaj!

Zoologia Ĝardeno.

La Londona Zoologia Ĝardeno, mallonge nomata „Zoo“ (angle elparolu „zu“), festis sian centjaran jubileon. Tiuokaze Londonano Kappa skribis jenan leteron publikigitan en The Nation and Athenaeum, la 4-an de majo 1929 (tradukita laŭ teksto de la Vegetarian News, Londono):

Mi bedaŭras, ke mi ne povas aldoni mian voĉon al la fiore de gratuloj por la centjara jubileo de la Zoo. Kun plezuro mi vidus la forigon de tiu ejo. Ne komprenu el tio, ke mi dubas pri la supereco de nia Zoo kiel Zoo. Sendube ĝi estas la plej bona, la plej humane estrata, la science plej valora, entute laŭ ĉiuj rilatoj la plej admirinda el ĉiuj Zooj. Mi tute simple malŝatas ĝin kaj ĉiujn Zoojn pro unu neevitebla malbono. En la Zoo oni tenas sovaĝajn bestojn en kaĝoj pro la plezuro de homaj estaĵoj. Mi ne vidas pli da motivo, por malliberigi bestojn pro homamuzo, ol por malliberigi homojn pro bestamuzo. Mallonge, mi opinias, ke Zoo, iu ajn Zoo, estas esence barbara institucio.

Mi ne kredas, ke iu scienca esploro povas esti argumento, por kapti sovaĝajn kreitaĵojn kaj teni ilin en enuiga mallibero ĝis la morto por la plezuro de la plej potenca kaj plej ruza el iliaj samkreitaĵoj. Se oni diras al mi, ke la bestoj estas pli feliĉaj en la Zoo Parko ol en siaj naturaj hejmlokoj, mi simple ne kredas tion. Jen unu el la sofistaj argumentoj, per kiuj ni kutimas kvazaŭ per opio dormigi nian kompaton.

La politika maksimo, ke bona regado ne estas bona anstataŭaĵo por menregado, estas aplikebla ankaŭ en ĉi tiu okazo, kaj mi ŝatus intervui la leonon en ĝia betona kaĝo pri la beno de la mallibereco. —

Certe, la letterskribinto estas prava, kaj tio sama estas direbla pri bestoj, kiujn oni tenas hejme en kaĝoj: paseroj kaj aliaj birdoj. Sed io plu estas dirota, kaj pri tio eble ne konsentas ĉiuj, kiuj kredas esti bestamantoj aŭ bestprotektantoj: la besto ne estas ludilo de la homoj, sed havas sian propran ekziston. La vivo, kiun havas hundo aŭ kato en homaj hejmoj, ne estas io natura por la bestoj, kaj la societo de tiaj bestoj dresitaj por la homosocieto ne estas inda societo por la homoj.

Iom post iom, per la progreso de la tekniko, ni liberigas de la sklavigo al la bestoj; la bestoj, kiuj servis nin, fariĝas iom post iom senutilaj por ni, kaj ilia plej bona sorto estas, ke ili ekstermiĝos per natura morto kaj manko de reproduktiĝo. Post kelkaj jardekoj oni supozeble ne vidos plu en urboj ĉevalojn, kiuj tiras veturilojn. Ju pli primitiva estas la kulturo kaj civilizo de iu regiono, des pli multe ĝi uzas ankoraŭ bestajn fortojn, ja, eĉ homajn fortojn por tio, kion faras pli progresintaj regionoj

per bestaj fortoj kaj ankoraŭ pli progresintaj regionoj per maŝinoj.

Pensu pri la orientaj landoj, en kiuj veturiloj estas ankoraŭ tirataj de mizeraj homoj. En aliaj landoj oni uzas por tiu celo bestojn (ĉevalojn), kaj en teknike pleje progresintaj landoj aŭtomobilojn kaj eĉ flugmaŝinojn. La eskimoj uzas hundojn kiel veturiltirantojn, kaj tiujn samajn hundojn ili manĝas, kiam mankas alia nutraĵo aŭ kiam la hundoj fariĝis tro maljunaj por tiu servo.

La maŝino liberigas la bestojn el ilia sklaveco kaj iom post iom anstataŭas ilian mizeran ekziston per neekzisto. Taŭga socia aranĝo devas zorgi por tio, ke ankaŭ por la homo la maŝino fariĝu liberigilo, sed ne por ekstermi la homojn, sed por feliĉigi la vivantojn kaj por eviti la naskiĝon de homoj, kies sorto ne povos esti io alia ol mizero.

Amikeco al la bestoj kaj vegetarismo.

Tiu, kiu amas la bestojn kaj ĝojas pri ilia vivado kaj agado, certe ne deziras kaŭzi tiujn suferojn, kiujn ili travivas, kiam ili estas ĉasataj, kaptataj kaj mortigataj, por ke ni povu „ĝui“ ilin, delikate preparitajn, dum tagmanĝo.

Konsekvence, amiko de bestoj ne povas simpatii kun ĉaso, nek kiel profesio nek kiel sporto. Kiel sporto la ĉaso certe estas al li malnobla. En antaŭaj tempoj, kiam la ĉasisto estis devigata per ponardo persekuti la bestojn, la „batalo“ estis iom egala; sed la eltrovo de pafiloj kaj precipe nuntempe la „batalo“ per modernaj ĉaspafiloj faris la fortojn tiom neegalaj, ke oni povas paroli nur pri cinika buĉado al sendefendaj bestoj. Paroli pri „nobla“ ĉaso ne estas korekte. Tia ĉasado aŭ buĉado ne nobligas sian homon. Pli ĝuste oni povas paroli pri ĉaso kiel malnobla agado. Precipe la publika opinio devus kontraŭstari la klak- aŭ pel-ĉasadon, dum kiu la bestoj estas pelataj antaŭen al la ĉasistoj, kiuj tiam mortigas ilin per la pafiloj. Inter ĉaso kaj buĉado estas nuntempe nur tiu diferenco, ke dum ĉaso ne estas mortigataj tiom da bestoj, kiom dum la regula ĉiutaga buĉado. La ĉasbuĉado okazas en la naturo, ĝenerala buĉado endome kaj pli laŭfabrike.

Rilate al la profesia ĉaso ekzistas la senkulpiĝo, ke la ĉasisto pafas la bestojn, por gajni monon, ne pro sia plezuro. Sed la ĉi-supraj motivoj kontraŭ la ĉaso valoras ankaŭ ĉi tie. Mortigo al sendefendaj bestoj ne fariĝos glora agado pro tio, ke ĝi donas profiton.

Tio, kio estas dirita pri la ĉasbuĉado, povas esti dirata ankaŭ pri fiŝkaptado (stranga plezuro, trompi la bestojn, tiel ke ili englutas anstataŭ vermojn pintan hokon!) kaj la profesia fiŝkaptado. Kompare, la fiŝoj, kankretoj, ktp. estas bestoj apartenantaj al pli malalta klaso ol la mambestoj kaj birdoj, kaj ilia nervsistemo estas malpli komplikita; sed, ĉu ili suferas, pri tio certe ne estas dubo. Mi memoras, ke mi vidis fiŝon en akvario, kiu estis persekutata de pli granda fiŝo. Mi kredas, ke la pli granda fiŝo jam estis manĝinta ĝiajn okulojn. La malgranda fiŝo fine, eble pro timo kaj doloro, enfosis sin en la sablon sur la fundo, kvankam tia agado certe estis fremda al ĝia naturo.

Kaj kiamaniere amiko de la bestoj povas simpatii pri la ĝenerala buĉado, kiam la tute sendefendaj kaj bonfidaj bestoj are estas kondukataj en la buĉejon kaj estas mortigataj unu post la alia? Oni komprenas, ke Tolstoj, iam vizitinte buĉejon, kun abomeno skribis kontraŭ ĉi tiuj „humanaj“ malbontraktadoj al la

bestoj. En sia plej bona aĝo, eĉ kiel nematuraj idoj, ili falas per la buĉilo de la buĉisto. La sango fluas dise sur la planko. La sangoferadoj de ĉi tiuj „civilizitaj, kristanaj“ homoj superas la altaroferadojn de la antikvaj hebreoj kaj idoloj.

Ĉu ĉiuj bestmortigoj kaj bestturmentadoj estas necesaj; ĉu ni ne povas vivi, ne mortigante la bestojn?

Rilate al la organaj produktaĵoj, kiujn ni uzas aliciele ol por nutrado, estas ofte malfacile scii, ĉu la ofte tiel kunmetitaj produktaĵoj estas faritaj el animalaj aŭ aliaj konsistaĵoj kaj ĉu ĉi tiuj konsistaĵoj estas pli aŭ malpli necesaj en la homa mastrumado. Sed estas interese scii, ke en Anglujo ĝuste lastatempe sukcesis penadoj, kiuj celas eviti piedvestaĵojn faritajn el animalaj (bestaj) substancoj.

Rilate al tiuj produktaĵoj, kiuj estas uzataj por nutrado, la vegetarismo montris, ke ili ne estas necesaj. Vegetaranoj almenaŭ siaparte kunlaboras, por malpligrandigi la suferojn de vivantaj estaĵoj.

Emil Dehn, Kopenhago.

Aktualaĵo.

La Berlina Ilustrita Gazeto raportas en sia 32-a numero (1929), sen iu kritika vorto, pri la „artifika bestkunfandiĝo“. La eksperimentistoj tranĉas la bestojn laŭlonge de la dorso kaj kunkudras du, laŭeble samspecajn kaj samgrandajn, bestojn. Rezultas, ke jam post unu semajno la artifice kunigitaj bestoj havas komunan organismon. Oni fortranĉis de unu el la kunaj bestoj gravan organon, ekzemple renon, kaj tiam la koresponda organo de la alia besto efikis por ambaŭ bestoj kune, eĉ kiam oni fortranĉis la renon, tiel ke unu besto estis eĉ tute sen reno. Kiam unu besto estas graveda, la alia besto, ĉu virseksa aŭ virinseksa, mortas antaŭ la nasko. Kompreneble oni ankaŭ inokulis malsanojn al la bestoj kaj observis la sekvojn.

La gazeto, kiu ja volas distri la publikon, ne diras, kiajn praktikajn konkludojn oni povas tiri el tiaj malpuraj ludoj. Oni ĉefe uzas kobajojn kaj ratojn por la eksperimentoj. Eble la eksperimentistoj kreis en si la imagon, ke per tia farado ili majstras la naturon. Sed ili malpurigas siajn manojn. Estas necese, ke per leĝo estu malpermesitaj tiaj agoj, kontraŭ kiaj ribelas sento kaj konscienco.

Alvoko.

La verdaĵo, per kiu kovras ĉion la printempo, vekas en mi miajn malnovajn revojn pri la aranĝado de esperantista kolonio, kies efektivigon malhelpis al mi la mondmilito, forrabinte la vivon de miaj samcelintoj.

Ĉar ĉi tie mi estas sola kun tia ideo, mi decidis turni min al esperantistoj-vegetaranoj de la tuta mondo, petante, ke ili aliĝu al mia ideo pri la aranĝado de kolonio en varma lando, kies registaro konsentus donaci aŭ por malalta prezo cedi al la novaj pioniroj, kiuj deziras alveni al la komuna patrino-tero, pecon da tero.

.....
Vegetara Hotelo „Pomona“ en Hago (Nederlando), Molenstr. 53, estas modela gastejo kaj devus esti vizitata de ĉiu samideano trapasanta Hagon. Varma kaj malvarma akvo en ĉiuj ĉambroj. Modela pureco.

Samideanoj, ne ŝanceliĝu, sed streĉu ĉiujn viajn fort-ojn, por efektiviĝi la ideon pri vegetarana kolonio, kiun ni bezonas por la plena liberiĝo el ĉio malbona. La prilaborado de la tero faras la homojn sendependaj kaj asecuras ilin kontraŭ la malsato, kiel diras unu el la sentencoj de Salomono la Saĝulo: „La prilaboranto de la tero estas sata per la pano“. La oro estas nenio kompare kun la pano, kion preskaŭ ĉiuj spertis dum la milito.

Personoj, kiuj deziras korespondi pri la aranĝo de vegetarana kolonio, skribu al: Jakobo Zmudskis, Šiauliai, Tilzės gatvė 194, Litovujo.

*

Aldono de la redaktanto: Publikigante la alvokon de samideano Z., mi rifuzas ĉiun respondecon pri la projekto; ĉar tro ofte jam oni spertis, ke tiaj entreprenoj de idealuloj malsukcesis pro manko de praktikuloj.

Mortpuno.

En malmultaj tagoj du mortpunoj estis aplikataj en la Ŝtata Malliberejo de la usona ŝtato Massachusetts. La mallibereja gardisto Hendry mortis post kolapso sekve de sia terura ofico. Li ekzekutis kondamnitajn sur la elektra mortiga seĝo, kaj lia plej terura memoraĵo estas la mortigo al Sacco kaj Vanzetti, 1927.

La gardisto Lawes de la Sing-Sing-Malliberejo (Usono), kiu havas la saman oficon, en la funebra parolado solene deklaris sian deziron, ke oni ĉesigu la krim-eĝon: mortigi homon pro mortigo.

La januara eldono de „Christian Register“ donis ĉi tiun sciigon kaj aldonis, ke tute aparte de ĉiuj leĝaj demandoj, la terura praktiko de mortpuno pezas sur multaj konsciencoj. La ordono estas ĝenerala: Ne mortigu. Ni ne rajtas fari mortigon kaj nomi ĝin leĝa.

Nia hispana samcelana revuo „Acción Naturista“ en sia aŭgusta numero, sub la titolo „Ĉu la homo manĝu viandon?“ citas la diro de Roberto Castrovido, batalanto kontraŭ la mortpuno:

„Estas tre simple aserti, ke la mortpuno estas necesa, sed: kiu ĝin plenumos? Ĉar tiu, kiu faras tian aserton devus havi la kuraĝon plenumi la mortpunon; se ne, lia opinio estas senvalorigata de la faktaj. Se vi, partianoj de la mortpuno, estus de la leĝo devigataj mem plenumi ĝin, kiom rapide vi pensus alimaniere! Kiom malmulte da firmeco havus via konvinko! Nu bone, kial aliaj devus fari agojn, pro kiuj vi mem sentus abomenon? Se la sentoj, kiuj malhelpas vin esti ekzekutistoj, estas humanaj kaj raciaj, kial vi postulas, ke ekzistu ekzekutistoj en la mondo?“

S-ro Angel Rico, en la „Acción Naturista“, daŭrigas dirante, ke la samon oni povas kaj rajtas diri pri la viandnutrado. Tion jam pruvis Tolstoj, kiam li havis gastinon, kiu diris, ke ŝi absolute bezonas viandon dum la manĝo. Kiam ŝi iris al la manĝotablo en la hejmo de Tolstoj, ŝi trovis sur sia loko grandan tranĉilon kaj, per fadeno ligitan al la tablopiedo, kokinon, por ke ŝi mem havigu al si la viandon, kiun ŝi opiniis necesa. Komprenoble ŝi ne estis kapabla, mortigi la kokinon, kaj ricevis bonan instruon per tiu ekzemplo.

Rigardu arbon. Kiom ĝi estas bela! Kaj tamen ĝi ĉiam volas kreski kaj fariĝi pli granda, pli bela. Perfekta ĝi estas kaj tamen plibeliganta ankoraŭ, pli grandiganta.

Tia estas ankaŭ nia lingvo Esperanto. Perfekta ĝi estas, kaj tamen ĉiam pli riĉa ĝi fariĝas kaj pli multe ĝi disvastiĝas. Kaj ĉiu nova aŭtoro, kiu majstras la lingvon kaj havas internan potencon, tiras el ĝi pli da beleco, montras ĝin en lumo ankoraŭ pli bela.

Kaj ni mem? Ankaŭ ni malgraŭ nia mirinda organismo, kiun neniu homa mano povas plibonigi, ĉiam celas al perfektigo. Kia estas la perfekteco, tion ni ne povas diri; ĉar ĉiu migranto ne vidas pli ol unu aŭ du kilometrojn antaŭ si.

Sed, ke perfektigemo ne akordiĝas kun cigaredo en la buŝo, kun kadavromanĝado kaj drinkado, tion ni scias.

El multaj landoj.

Aŭstrujo. La Viena Naturkuraca Unuiĝo havas propran bordan banejon ĉe la Danubo, kun kabanaj, gimnastikejoj kaj refreŝejoj. Redaktanto de ĝia organo „Naturheilzeitung“ estas de nun S-ro Rudolf Elkan, Vieno VI, Liniengasse 33.

Danujo. La vegetara infanhejmo de D-ro Mikaelo Larsen estas nun malfermita sub gvido de instruisto Vald. Bloch kaj edzino en Flakkebjerg. Ĝi komencas modeste pro manko de sufiĉaj kapitaloj; sed ĝi komencas, por ke la mono jam kolektita ne dormu. Donacojn akceptas la Dana Vegetara Societo (adreso Egerod). En oktobro komenciĝos kurso pri vegetara mastrumado en la altlernejo de Roskilde.

Germanujo. Dimanĉon, la 8.9.29, la Nordgermanaj Vegetaranoj renkontiĝos en Segeberg (Holstein), je la 11-a horo ĉe la atendejo de la stacidomo.

Grekujo. Sub la devizo de Pitagoro: „Kutimigu vin al pureco“ la registrita Vegetara Societo en Saloniko „La Ora Epoko“, kies gvidanto estas nia samideano Johano Spatharis en Saloniko, disvastigas la vegetaran senton en Grekujo. Samideano Spatharis gvidas senpagan kurson de Esperanto.

Norvegujo. La Norvega Vegetara Societo, sub prezido de s-ino Marta Fleischer, nun revivigis sian malnovan organon: „Naturlegen“ (La Naturkuracisto). La sekretario de la N. V. S., D-ro Hans Jakob Rögler, raportis dum la kongreso, ke la laboro en lia lando prezentas specialajn malfacilaĵojn, sed ke lastatempe bonaj progresoj estas faritaj. Ekzistas nur unu veg. manĝejo en Oslo kaj unu en Bergen. Apud Oslo estas unuaklasa veg. sanatorio, kaj ĉe la okcidenta marbordo ekzistas du veg. kuracejoj. Komprenoble, lando, kiu parte nutras sin per fiŝkaptado, ne akceptas facile niajn ideojn.

Kuba Insulo. En la urbo Matanzas D-ro Leante, strato Nicolás Heredia 21, laboras por la disvastiĝo de naturismo.

Polujo. Prof. Marjan Lubecki, strato Miodowa 21, m. 6, Varsovio, eldonis tre bonan, koncizan kaj trafan flugfolion „Dlaczego nie jemy miensa“ (Kial ni ne manĝas viandon), kiu meritas grandan disvastiĝon. Li ordigas la motivojn laŭ humanaj, higienaj, estetikaj, sociaj, psikologiaj, kaj lia unua frazo estas: La homo ne havas la rajton, kaŭzi doloron, kaj tio rilatas ne nur la aliajn homojn, sed ĉiun estaĵon dolorsentkapablan.

Sovjetunio. Laŭ registara dekreto de la 15.4.1929 la Moskva Vegetara Societo je Nomo de Leono Tolstoj estas malpermesita, kaj tial la societo, kiu ekzistas de dudek jaroj, nun ĉesis ekzisti. La arkivo estas transdon-

ita al la Tolstojmuzeo en Moskvo. Ankaŭ la Vegetara Manĝejo de la Societo ĉesis ekzisti; sed ĝi transiris al ŝtata posedo. La vegetara infanejo estas dissolvita. Ekzistas ankoraŭ: Societo de la Amikoj de Leono Tolstoj, kiu eldonas cirkulerojn. Adreso: Moskvo, poŝtfolio 626, V. G. aŭ V. V. Ĉertkov.

(Pro troeco de alia materialo ni publikigas nur malmulte „el multaj landoj“ en ĉi tiu numero.)

Vegetaraj Manĝejoj.

Frankfurto a. M., Germanujo: „Eden“, Börsenplatz.

Cannes-La Bocca (Alpes Maritimes), Francujo: Villa Les Naturistes, S-ino Bivert, Boulevard de l'Estérel.

Aix en Provence, Francujo: S-ro Meunier, Le Val des Pins, Petit Chemin du Tholonet.

Juan le Pins (Alpes Maritimes), Francujo: Vil'jo Salluste près l'Hôtel Mimosas.

Nice, Alpes Maritimes, Francujo: „Les Lauriers“ Colline St. Antoine.

Sculac-sur-Mer (Gironde), Maison des Petits à l'Amélie.

Gloggnitz, Aŭstrujo: Pensiono „Herrenhaus Aue“, ĉe la Semmering-montaro, kun ĉiu moderna komforto; vegetara.

Hahnenklee, (Oberharz), Germanujo: Vegetara Pensiono Viktorialhaus, tre rekomendinda pensiono en unu el la plej belaj regionoj de la Harcmontaro. 600 m super la marnivelo; modela laga banejo tute proksime.

Rochester, Kent, Anglujo: 76 High Street, Esperca Café and Bakery. Rochester and Chatham Health-Food Stores. Oni parolas Esperante. Ĉambro disponebla por naturkuracisto.

Batheaston, Bath, Anglujo: G. Tollemache, Vegetarian Guest House. Kvaronhoro per tramo al Bath kaj varmaj mineralaj naĝejoj.

Stokholmo, Svedujo. „Vegetaria“, restoracio en Drottninggatan 82.

Vence (Alpes Maritimes), Francujo. Internacia Vegetara Kampadejo (kampi = loĝi sur kampo), Quartier de l'Adrech, Chemin du Riou; alteco 460 super la marnivelo. Je unu horo de Nice, Belega panoramo al la Alpoj kaj la Mediteraneo. Vegetara vivado. Senprofitaj malaltaj prezoj. Pri ĉiuj detaloj demandu Sinjorinon Benigni, prezidantino de la Nicea Branĉo de „Trait d'Union“, Pavillon Rose, Plateau du Piol, Nice (Alpes Maritimes). Skribu en Esperanto; aldonu poŝtmarkon aŭ respondkuponon. Aparte ekzistas Hejmo por Infanoj, kie la infanoj estas vartataj dum la tuta jaro.

Vegetaraj kaj parenccelaj eldonaĵoj.

„**Kiwoth Hatawah**“ (La enterigo de la pasioj), traktadoj pri la vegetarismo sur la bazo de la teologio, la scienco, la tradicio kaj la etiko. Havebla ĉe la aŭtoro Rabeno Isaak Hebenstreit, Rzeszów, Polujo. 55-paĝa, prezo ne montrita. En hebrea lingvo, tre bele presita, broŝurita. —

En la antaŭparolo la aŭtoro diras, ke en nia epoko li atendas la plenumon de profetaj promesoj, kaj per citaĵo laŭ la profeto Hoŝea li esprimas al la homaro siajn bondezirojn. La verko mem citas bibliajn dirojn, kiuj rilatas al la viandmanĝado. En bela hebrea lingvo la aŭtoro esprimas siajn ideojn kaj apogas sian interpreton

per multaj trafaj argumentoj de bibliexploristoj. Aliaj ĉapitroj prenas kiel bazon la talmudon (gemara), la miŝnon (tanaim) kaj la talmudkomentojn. La verko estas la rezulto de tre laborema kaj konscienca studado. M. S.

Der Pranger, red. Heinz Nonveiller; eld. Bund für radikalen Tierschutz (Ligo por radikala bestprotektado), Graz, Aŭstrujo, Freiheitsplatz 2, II. Ludas la rolon de „pilorio“ por ĉiuj kruclajoj kontraŭ bestoj. Vegetara. Germanlingva.

Ĉekáni (La Atendado), organo de la Ĉeĥoslovaka Abstina Ligo, adreso Brno, Falkensteinerova 6.

Kontraŭ Vivisekado eldonis bonan ĉefan flugfolion la Societo de la Bestamikoj (Sdruzeni Prátel Zvirat), Prago XII, Mánesova 42.

Victor Lorenc (1876—1929), memoriga kaj honoriga biografio, de Sophie Zaikowska; eldonejo „Végétalien“, 131 Rue Saint Gratien, Ermont (Seine-et-Oise), Francujo. Prezo ffr. 1.50. Francilingva.

So sollst du leben (Tiel vi vivu!); prezo RM 2.80. **Sennenvitamin als Nahrung** (Sunvitamino kiel nutraĵo); prezo RM 1.80. **Lebensweiser** (Vivgvidilo); prezo 0.50, jarabono RM 5.50. Tri eldonaĵoj de la eldonejo Lebensweiser, Gettenbach bei Gelnhausen (Hessen), Germanujo. Ĉiuj vegetaraj, instruaj, multilankaj. Germanlingvaj.

Esperantaj Eldonaĵoj.

Bela Joe, aŭtobiografio de hundo, aŭtorino marŝalino Saunders, tradukintoj J. Blaikis kaj N. Hohlov, eldonita ĉe Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, Londono W. C. 2, Anglujo, 310-paĝa ilustrita volumo. Prezo ŝ. 3/6, tolbindita 5/-.

Prologo, jubilea kolekto de originalaj poemoj de Eŭgeno Mihalski, eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda, Lipsio O. 27, Colmstr. 1, Germ. 62-paĝa, prezo germ. M. 0.70. Kial oni eldonas tiajn farajojn?

Kandid aŭ la Optimismo, de Vølter, tradukis E. Lanti, kun ilustraĵoj de R. Bartelmes, eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda, sidejo Parizo 20, rue Boyer 23; administrato Lipsio O. 27, Colmstr. 1, Germ. 162-paĝa, prezo germ. M. 1.70. Bonvena riĉigo de la Esperanta literaturo tradukita.

La Dormanto Vekigas, romano de H. G. Wells tradukita de A. Frank Milward, eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Londono W. C. 1, havebla ĉe la Brita Esp.-As., adreso ĉi-supre. 210-paĝa. Sonĝo pri la estonteco, tipe Wells-a. Prezo 3/6, tolbindita 5/-. Bedaŭrinde ne kontrolita de E. L. A.

Aŭstrio, tre bele ilustrita propagandfolio eldonita de la Aŭstra Ministerio por Komercio kaj Trafiko, Vieno. Havebla ĉe Österreichisches Verkehrsbureau, Friedrichstr. 1, Vieno 1, Aŭstrujo.

Klasika Legolibro. Broŝuro eldonita de Em. Robert, 6 Rue Ravignan, Parizo 18; prezo afrankite ffr. 1.50. Kolekto de plej diversaj legaĵoj. Pro la lingva korekteco tiu libreto estas rekomendinda por ĉiuj Esperantokursoj.

Poŝtkarton kun la bildo de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof eldonis R. Dekegel kaj P. P. Collin, Dender-

.....
Vegetara Manĝejo en Zuriko (Svisujo), posedanto E. Hiltl, Sihlstr. 26—28. Tre rekomendinda vegetara manĝejo kun propra kukfarejo. Senalkoholaj vinoj.

straat 58, Aalst (Alost), Belgujo. Prezo 1 svisa franko por 10 ekzempleroj.

La Nova Vivo, kajero 7—8 el la Biblioteko Nova Kulturo, adreso: Atanas Nikolov, str. Car Iv, Siŝman 19, Burgas, Bulgariujo. Ĉi tiu kajero enhavas artikolojn de Petro Dynov: La Nova Vivo, La Mallarĝa Vojo kaj Pensoj pri la Vegetarismo.

Kleiner Esperanto-Lehrer für das Gastwirtsgewerbe (Malgranda Esperanto-instruilo por la gasteja industrio), por sininstruado, de E. Markaŭ, Potsdam; eldonejo Friedrich Ellersiek G. m. b. H., Berlino S. W. 61, Wilmsstr. 5, Germanujo. Prezo RM 0.60. Utila libreto, ankaŭ por negastejistoj, tre utila por kelneroj.

Ĥinujo kaj Problemo de Internacia Lingvo, de D-ro Won Kenn, eldonita de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, poŝt-ŝiako 1332, Ŝanhajo 1929. Bele presita finlingva broŝuro kun portreto de Zamenhof.

Pri Esperanto-stenografio (sistemo Brabbée) informas flugfolio de Eldonejo Karl Fromme, Vieno V, Nikolsdorfer Str. 7-11, Aŭstrujo.

Flandra Esperantisto, organo de Flandra Esperanto-movado, red. Jan van Schoor, Julius De Geyterstr. 149, L., Antverpeno, Belgujo. Jarabono 3 belgoj (enlande 2 b.); monata.

La Nova Homaro, La Universa kaj Kosma Amo, de Petro Dynov, broŝuro N-ro 5-6 el la supre citita kolekto Nova Kulturo.

Espero Teozofia havas novan adreson: Prago-Sporilov 45 — 22, Ĉeĥoslovakujo; eldonanto Václav Cimr.

Teozofio kaj ĝia Doktrino, eldonita de la Teozofia Esperanta Ligo (ligokotizo jare 1 sfr.), havebla ĉe V. Cimr, Prago-Sporilov 45-22.

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio, eldonejo Parizo IX, 51 rue de Clichy; prezo 1 sfr. Jen tre bonvena publikaĵo, kiu estas eĉ necesa kaj devus esti legata de ĉiuj esperantistoj-lingvointeresuloj. „La bulteno aperas ĉiufoje, kiam la Akademio havas ian oficialaĵon por konigi“. Jarabono 5 sfr.

Poezioj de L. L. Zamenhof, skribitaj en Esperanta Stenografio, sistemo Duployé-Flageul. Prezo 1 respondkupono. Eldonejo: P. Flageul, 9, Boulevard Voltaire, Issy-les-Moulineaux, (Seine), Francujo.

Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, Parizo 9, rue de Clichy 51; prezo 2 sfr.

Internacionalstenografio, F. de Kunovski, eldonejo D-ro Höke, Duisburg, Friedenstr. 79, Germanujo.

Nov-Ĉinia Esperanto-Asocio, poŝtkesto 16, Kanton. Ĉinujo (strata adr. 16, Tai-Nan Road, Kanton) sendas alvokon por kunlaboro por Esperanto.

Libero, organo de Sankoo-Esperantogrupo, Daisan Kotogakko (la tria universitato), Kioto, Japanujo.

La Formoso, organo de Taihoku-Esperantosocieto, Taihoku, insulo Formoso, Japanujo.

Dudeka Universala Kongreso de Esperanto (Antverpeno), oficiala dokumentaro eldonita de la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, 12 Boul. du Théâtre, Genevo, Svisujo.

Petoj, Informetoj, Respondoj, Deziroj.

Preseraro. En nia aprila numero, sur paĝo 14-a, lasta linio sub Sovjetunio, mankas unu linio: „-cidrajto kaj eĉ la Fabrika Decidrajto estas tre disvast-“.

Represo el la bulteno estas permesata kaj eĉ dezirata kondiĉe, ke la Vegetarano kiel fonto estu citata.

La Redaktanto ne povas doni individuan respondon al ĉiu letero aŭ poŝtkarto ricevita. Regularon, emblemon kaj membrokartojn nia VLE ne havas. Ĝiaj ĝeneralaj principoj estas represitaj en ĉiu numero de la bulteno. La poŝtkartoj eldonitaj antaŭ dudeko da jaroj ne estas plu haveblaj.

Sian libertempon la redaktanto pasigis en la Harem-montaro, vilaĝo Hahnenklee. Li varme rekomendas la tiean vegetaran pensionon gvidatan de gevegetaranoj. Vidu sub Vegetaraj Manĝejoj.

Pri la ideoj esprimitaj per paroladoj aŭ artikoloj represitaj en la „Vegetarano“ ne la redaktanto, sed nur la aŭtoroj havas respondecon.

Elĉerpitaj estas la numeroj XII/1 kaj 2 de nia bulteno. Novaj abonantoj do ricevos, anstataŭe, numerojn el antaŭaj jarkolektoj.

Propono Yelland: En ĉiu lando la esperantistoj starigu apartajn societojn vegetarajn kaj aligu ilin al la Internacia Vegetara Unio (kiel jam faris la Londonanoj), por sendi esperantistojn kiel delegitojn al la kongresoj kaj tiel triumfigi nian lingvon.

Monon oni ne sendu al la „Vegetarano“, sed al la nomo de la redaktanto; ĉar por la poŝtaj aŭtoritatoj Vegetarano ne estas persono, kiu povas kvitanci, nek registrita firmo.

Religiaj (kristanaj) Socialistoj estas petataj doni sian plenan nomon kun adreso por komuna internacia agado al J. L. Bruijn, Daguerrestr. 156, Hago (Nederlando) poŝtĉeka konto 860.

Filino naskiĝis al niaj gesamideanoj Sydney kaj Irene Smith, Londono N. 8, Womersley Road 36, Anglujo. La gepatroj estas vegetaranoj, kaj la malgranda Christine apartenas do al la vere nova generacio, kiu portas niajn esperojn je pli bona estonteco. Korajn gratulojn!

Monda Tago por Bestoj. La Tutmonda Ligo kontraŭ Vivisekado kaj por la Protekto al Bestoj (angla branĉo: 47 Hamilton Road, Highbury, Londono N. 5) difinis la 4-an de oktobro kiel Mondan Tagon por Bestoj kaj insistas, ke almenaŭ en tiu tago oni pensu, parolu kaj agu por suferantaj bestoj.

Nia oklingva flugfolio servas por propagando inter ne-esperantistoj kaj akompanas tiujn ekzemplerojn, kiuj estas sendataj al naciaj vegetaraj organizoj aŭ revuoj, al gast-ejoj ktp. Vian ekzempleron ne forjetu, sed uzu por propagando.

Londona Esperanta Vegetara Societo (E. V. S.). La adreso de ĝia hon. sekretario Hilda Lane estas nun: 76 High Street, Rochester, Kent, Anglujo.

Esperantista Renkontejo, Barcelono, strato Durán y Bas 8, ĉefetaĝo. Informejo por esperantistoj, malfermita labortage de 18-a ĝis 20-a horo.

Manuskriptoj, kiuj pro manko de loko devos aperi en venontaj numeroj de „Vegetarano“:

Aleksandro Batjek „La Vegetarismo kaj la ĉiutaga Vivo“.

Agro: „Elektro kulturo“. „Negro pri eŭropa Nutrado“

Emma L. Osmond: Historio kaj Efiko de Tabako.

Walter Etzold: La fonto de ĉiu sufero (daŭrigo).

Petro G. Pamporov: Vegetarismo kiel unua ŝtupo

(plena parolado).

Repagu viajn kotizojn! Kvitancoj aperos en sekvonta numero.

Internacia Vegetara Unio. / The International Vegetarian Union. Union Internationale Végétarienne. / Internat. Vegetarische Union.

Sekretario: Red. Hans Feix, Warnsdorf VI/1810, Ĉeĥoslovakio.
Kasisto: Oluf Egerod, Rødkildevej 40, Brønshøj, Kopenhago, Danujo.

Deksesa Bulteno.

**Oficialaj Sciigoj de la Sekretario,
Aŭgusto 1929-a.**

1. Ĉiuj societoj apartenantaj al la I. V. U. estas petataj, de nun **ĉiujare** akurate pagi siajn kotizojn, kaj ne kvin minutojn antaŭ la venonta kongreso.

2. Ĉiuj societoj estas petataj, indiki la nombron de siaj anoj.

3. La duan dimanĉon en septembro oni aranĝu en tuta Eŭropo festojn de vegetaranoj (rikolffestojn), kaj oni akcentu per radio kaj gazetaro la signifon de la vegetarismo. Se eble, oni ankaŭ raportu per radio kaj gazetaro pri la kongreso en Steinschönau (Kam. Šenov).

4. La paroladoj faritaj dum la kongreso de Ruzička, Berg, Walsh, Ude, Batjek kaj Pamporov kaj la rezolucioj estu publikigataj de la societoj en la faka kaj, se eble, ankaŭ la ĉiutaga gazetaro. La ĝenerala sekretariejo metas anglajn kaj germanajn tekstojn je la dispozo de la societoj.

5. Ĉiuj societoj bonvolu daŭre sendi senpage du ekzemplerojn de siaj revuoj al la ĝenerala sekretario por la arkivo de la I. V. U. Speciale oni sendu al Warnsdorf ĉiujn raportojn aperintajn pri la kongreso. Krome la fotografiaj faritaj de amatoroj estas kolektataj por la IVU-arkivo, kaj ni petas, ke de ĉiu foto oni sendu unu ekzempleron al la sekretariejo.

6. La societoj raportu laŭeble plej baldaŭ pri la festoj aranĝitaj dum la dua dimanĉo de septembro.

7. La oficialaj fotografiaj de la kongreso estas haveblaj ĉe la fotografo Josef Zimmermann, Steinschönau. La poŝtkartoj kostas RM 0.25 kaj la bildoj en formato 18×24 cm kostas RM 1,—.

Atentu!

Pro teknikaj kaj financaj kaŭzoj ne estas eble, presigi en la „Vegetarano“ ĉiujn paroladojn de la kongreso du-lingve. Pli ol iam montriĝis ĉe la kongreso kaj montriĝas nun la nepra bezono de Esperanto. Estas necese, ke ĉiu, kiu partoprenas en internacia movado, lernu Esperanton.

Notice!

For technical and financial reasons, it is impossible to print in the „Vegetarano“ all conferences in two languages. English-speaking readers will find the speeches in The Vegetarian News and The Vegetarian Messenger. More than ever the absolute necessity of Esperanto became evident during the congress and for our international publications. It is imperative that everybody who takes part in an international movement learns Esperanto.

Sixteenth Bulletin.

**Official informations from the Hon. Secretary,
August 1929.**

1. All societies which belong to the I. V. U. are requested henceforth to pay punctually every year their contributions, and not five minutes before the next congress.

2. All societies are asked to indicate the number of their members.

3. On the second Sunday in September (this year September 8th), vegetarian festivities (harvest festivities) ought to be arranged throughout Europe. Through radio and the press stress should be laid upon the significance of vegetarianism. If possible, report also by radio and press about the congress of Steinschönau.

4. The speeches and conferences held during the congress by Ruzička, Berg, Walsh, Ude, Batyek and Pamporov as well as the resolutions should be published by the societies in their press organs and, wherever possible, also in the ordinary newspapers. The Hon. Gen. Secretary of the I. V. U. holds English and German texts at the disposal of the societies.

5. All societies are requested continually to send free of charge two copies of their press organs to the Hon. Secr. for the files of I. V. U. Please send especially to Warnsdorf all reports published about the congress. Besides, amateur photos of the congress are collected by the I. V. U. secretariat, and we therefore ask amateurs to send one copy of each photo to Warnsdorf.

6. The societies should report as soon as possible about the festivities arranged on the second Sunday of September.

7. The official photos taken during the congress can be bought from the Photographer Josef Zimmermann, Steinschönau, Czechoslovakia. The price is: post cards RM 0.25, photos 18×24 RM. 1,—.

Zur Beachtung!

Aus technischen und geldlichen Gründen ist es unmöglich, im „Vegetarano“ alle Reden in zwei Sprachen zu veröffentlichen. Mehr als je ergab sich während des Kongresses und für unsere internationalen Bekanntmachungen die dringende Notwendigkeit des Esperantos. Es ist unbedingt erforderlich, daß jeder, der an einer internationalen Bewegung teilnimmt, das Esperanto erlernt.

Attention!

Des motifs techniques et financiers nous empêchent de publier dans le „Vegetarano“ toutes les conférences en deux langues. Plus que jamais la nécessité de l'Espéranto s'est montrée évidente pendant le congrès et pour nos publications internationales. Il est absolument nécessaire que tous ceux qui prennent part dans un mouvement international apprennent l'Espéranto.

Sliparo pri Vegetaranoj.

La Internacia Vegetara Unio, dum sia kongreso en Steinschönau, decidis krei sliparon pri vegetaranoj. Oni sendu simplan poŝtkarton al tiu unuiĝo kun la

indiko, ke oni estas efektive vegetarano kaj kun detaloj pri nomo, profesio kaj adreso, sen iu alia teksto. Skribu tre legeble!

La Sepa Internacia Vegetara Kongreso 1929.



Ĉiun trian jaron la organizitaj vegetaranoj de la tuta mondo serĉas la eblecon, kunesti en kongreso, por priparoli komunajn pensojn, por studi la diversajn vojojn, kiuj kondukas al nia celo, por fari en la loko de la kongreso efikan manifestadon pri niaj ideoj kaj fine, por senti ree la parencecon kun homoj alilandaj kun samaj celoj. Tiun ĉi jaron tiu kongreso okazis en la urbeto Steinschönau (Kam. Senov) en Ĉeĥoslovakujo, kaj laŭ ĉiuj raportoj ĝis nun ricevitaj pri la kongreso la diritaj celoj de la kongreso estas plene atingitaj.

La kongreso estis plena sukceso, kaj sinjoro Hans Feix, la ĉefa organizinto, povas esti tre kontenta pri la rezulto de siaj klopodoj. Dum la 7-a kongreso la ĝisnuna sekretario, sinjoro Oluf Egerod, proponis kaj akceptigis, ke oni en ĉi tiu jaro kunvenu en malgranda loko, ne en urbeĝo; la faktoj montris, ke liaj argumentoj estis trafaj, kaj al li kaj al sinjoro Feix iris la danko de la ĉeestantaro.

La urbo Steinschönau mem laŭ plej modela maniero gastame akceptis la kongresanojn. La vicurbestro, s-ro Karl Lorenz, ĉeestis la kongreson kaj donacis al ĉiu oficiala delegito valoran kristalpokalon skizitan de Prof. A.

Dorn, kun memorenskribo, desegnita de la instruisto pri desegno, s-ro Emil Kromer. Tiu sama instruisto Kromer gvidis la koncertojn kaj la horojn, kiuj plibeligis la aranĝojn.

Prezidanto de la kongreso estis s-ro Bernhard Oskar Dürr, 73-jarulo, kiu de 26 jaroj vivas vegetare. Laŭ la regularo, kies enhavon pri tiu punkto oni konfirmis dum la kongreso, li restos prezidanto de la I. V. U., ĝis kiam la loko de la nova kongreso (1932) estos difinita. Pro la morto de nia kasisto sinjoro Egerod, la ĝisnuna sekretario, transprenis la oficon de kasisto, kaj s-ro Hans Feix prenis la oficon de sekretario de la I. V. U.

La delegito de la internacia Vegetara Ligo Esperantista, samideano Emil Mai el Gablonz (Jablonec) ĉeestis jam la renkontiĝon de vegetaranoj sur la monto Lausche, la 7-an de julio. Li raportas, ke laŭ lia tasko 150—200 partoprenantoj ĉeestis. La verando sur la pinto de la monto, 791 m super la marnivelo, estis plenplena, kaj la verda stelo estis tie tre ofte videbla. S-ro Schnitzer malfermis tiun kuneston je la 13-a horo per salutaj kaj bonvenigaj diroj. S-ro Schirrmeister, konata naturkuracisto el Berlino, paroladis, dirante, ke la reformigo de vivo

kaj kuracado laŭ lia opinio estas la elirpunkto por la liberigo el socia mizero.

D-ro Pamporov el Bulgarujo parolis en Esperanto, dirante, ke la vegetarismo estas la unua ŝtupo de pli alt-nivela vivo kondukanta al la tutmonda frateco de la homaro socie organizita. Tiam la homo fariĝos vivanta sunradio kun amo en la koro, lumo en la pensoj kaj libereco en la animo.

Samideano Mai tradukis liajn dirojn germanen. Jam sur la Lausche-monto Esperanto estis lingvo samrajta kun la aliaj, kiujn oni aŭdis: ĉefe germana, iom da angla kaj iom da ĉeĥa lingvo estis tie uzataj.

James Hough, la sekretario de la brita Vegetara Societo, Manchester (fondita 1847), esprimis sian ĝojon pro la forteco de la movado, kiun montris la kunesto sur alta monto, tiom proksime je la ĉielo. Fink-Jensen el Danujo akcentis la humanecan spiriton de la vegetara movado. D-ro Schläger el Kassel (Germanujo), prezidanto de la Germana Vegetara Ligo, diris, ke la vegetaranoj juris batali por krei pli bonan estontecon. Georg Förster, gvidanto de la germana revuo „Vegetarische Presse“, raportis pri siaj spertoj. Van Borrendam el Nederlando salutis la montojn; ĉar li venis el lando de la ebena tero kaj de la bovinoj. Redaktisto Novák el Troppau (Opava) raportis pri la ĉeĥa vivreformo movado kaj pri la rilatoj de la virinoj al la vegetarismo. Fraŭlino Eleonora Paulová-Ruzičká faris paroladon pri la „Vegetara Nutraĵo kiel fundamenta elemento en la racia organizo de hejma mastrumo“. Ni ĝin represos en nia bulteno laŭ Esperanta manuskripto ricevita. Tiun paroladon sekvis diskuto.

Moriz Schnitzer el Varnsdorf fermis la kunsidon, esprimante la deziron, ke la vegetaranoj atingu la ekonomian potencecon sen perforto, celante al persona individua libereco de la spirito. Pri la tabakuzado li diris: „Kiu sunbanas, por tiu ne valoras la blua nubaro“, k'arigante, ke homo fariĝinta vegetarano ne plu ŝatas multajn „ĝuojn“ ankoraŭ ŝatatajn de ne-reformuloj. Ĉeestis ankaŭ la 79-jara poeto Wilhelm Ressel, kiu dediĉis poemon al la I. V. U.

La Ĉefkunsido, la 8-an de julio, okazis laŭprogramo en la Urba Teatro de Steinšönau. Marianne Wolf el Komotau (Chomutov), naskita vegetaranino, deklamis salutpoemon, kaj la prezidanto Dürr salutis la ĉeestantojn en lingvoj germana, esperanta, franca kaj angla. Pri niĝ mortintoj, IVU-kasisto D-ro Hugo Nolthenius, Karl Miĥa kaj la edzino de nia samideano D-ro Batĥk li diris memorigajn vortojn. Sekvis la agad-raporto de la ĝisnuna sekretario Oluf Egerod, kiun ni represas aliloke. Ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj plej gravaj veg. organizoj en Eŭropo. La regula kaskontrolo ne povis esti farata pro la morto de samideano Nolthenius; sed liaj kasraportoj kaj bilancoj publikigitaj en „Vegetarano“ montras, ke ĉio estas en bona ordo.

Longan diskuton kaŭzis la propono de la nederlandaj amikoj, akcepti kiel aliĝantajn societojn nur tiajn, kies membroj estas ĉiuj vegetaranoj. La rezulto estis, ke oni tamen ne faris ŝanĝon en la regularo, kiu postulas, ke nur tiaj societoj povas esti anoj, kies estraro konsistas el vegetaranoj kaj kiuj celas disvastigon de la vegetarismo. Bedaŭrinde ĉi tiu diskuto kaj la diskuto pri la internacia Vegetara Emblemo prenis tro longan tempon, tiel ke la reprezentanto de la internacia Vegetara Ligo Esperantista ne povis plu diri sian saluton, sed devis skribi doni ĝin al la kongresarkivo. Ankaŭ aliaj delegitoj ne havis tempon por siaj diroj.

Oni preparolis ankaŭ la proponon, ke fiksa prezidanto estu elektata; sed venkis en la diskuto la ĝisnuna sistemo,

ke estu prezidanto de la IVU ĉiam la prezidanto de tiu landa organizo, kiu entreprenas la kongreson.

Post tri jaroj, en 1932, okazos la sekvonta kongreso, supozeble ĝi okazos en Stutgarto (Stuttgart), Germanujo. Ĝia organizanto tiam estos la Ligo de Germanaj Unuiĝoj de Vegetaranoj (Verband deutscher Vegetariervereine), prezidanto Karl Gumprecht, inĝeniero, Berlino-Pankow, Schmidtstr. 7.

Pri la Saxon-fondaĵo oni diskutis kaj eĉ iom disputis. Temis precipe pri la donaco de mono al Aŭstrujo el tiu fondaĵo. Per 19 kontraŭ 12 voĉoj la kongreso malakceptis la proponon, laŭ kiu la estraro devus esti kvinkapa anstataŭ trikapa. Pri la emblemo oni ne faris definitivajn decidojn, sed ĝenerale rekomendis la oran emblemon, kiu estas uzata en Svedujo kaj bone konata jam en Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Germanujo, Polujo kaj la nordaj landoj.

Oni konfirmis la internacian „Vegetaran Tagon“ kaj riksis ĝin je la dua dimanĉo en la monato septembro. Tiun ĉi jaron do oni festos tiun tagon la 8-an de septembro.

La rezolucioj de la kongreso koncernis la jenajn dezirojn esprimitajn kaj plenumotajn.

Ni starigu gazetarajn kaj propagandajn centrojn, kiuj en ĉiu lando havigu al la gazetoj kaj ankaŭ rekte al la publiko informojn pri vegetarismo.

Ni uzu Esperanton, la Filmon kaj la Radion por la propagando.

Ni starigu en ĉiu lando sliparojn pri (efektivaj) vegetaranoj kaj aranĝu informservon kaj statistikon pri la spert-sukcesoj de vegetaranoj.

Internacia Scienca Komitato por Eŭbiotiko estu starigata kun la du universitataj profesoroj: D-ro Stanislavo Ruzička, Bratislavo, kaj D-ro Johano Ude, Graz, kiel gvidantoj. Krom tiu internacia centro por eŭbiotiko estu fondataj en ĉiuj landoj, de la vegetaraj organizoj, laborcentroj por eŭbiotiko (eŭbiotiko estas la scienco pri bona kaj saniga vivado).

Ni ebligu internaciajn interkonsentojn por la senpaga transdaganigo de fruktoj, speciale sudlandaj, kaj ni iniciatu ĉe la Naciara Ligo la progresigon de ĉio, kio apogas la vegetarismon.

Pro la politikaj disputoj tiutempaj inter registaroj hungara kaj ĉeĥoslovaka, la Hungaroj kaj Ĉeĥoslovakoj ĉeestantaj la kongreson formuligis specialan rezolucion, kiu akcentis ilian fratecon kaj pacemon.

Dum la diskutoj ofte estis tuŝataj la parencaj movadoj: batalo kontraŭ alkoholo kaj tabako, ankaŭ seksa sindetenemo. Nia delegito notis jenajn frazojn el la diskutoj: „Vegetarano estas, kiu ĉiam penas vivi en harmonio kun la leĝoj de naturo kaj spirito“. „Ĉar ni, ĉeestantoj, ne estas ĉiuj denaske vegetaranoj, ni ne rajtas distingi nin rilate al grada perfekteĝo“.

Tre impresaj kaj frapaj estis la diroj de nia samideano Petro Pamporov, kiu raportis pri la granda disvastigo de la vegetarismo etika en Bulgarujo.

Pri la paroladoj, el kiuj multaj citis tiun de Prof. Ude kiel la plej impresan, ni nur iom post iom, laŭ la disponebleco de spaco povos raportii. La Esperantovespero, sub gvido de nia samideano D-ro Hiekel el Leitmeritz, estis tre sukcesa. Dum ĝi faris paroladon D-ro Batĥek pri „Vegetarismo kaj la ĉiutaga vivo“; sinjorino Helene Schwartz-Leffler el Vieno kantis per bela, potenca voĉo.

Vizitoj al la loka industrio, mirinda vitro-industrio, kaj ekskurso al la Elbo, komuna festeno kun 200 partoprenantoj ornamis la kongreson. La kongresanoj loĝis senpage, pro kio la Steinšönau-anoj meritas tute apartan dankon.

La tuta kongreso, tion akcentis speciale kelkaj parolantoj, ekz. D-ro Walsh el Anglujo kaj Pjemysl Pitter el Prago, staris sub la signo de internacia frateco, komuneo de celado, ĝojo de samcela agado. Kun nova entuziasmo, nova energio por laboro, ĉiuj partoprenantoj reiris al siaj hejmurboj, kaj ni rajtas esperi, ke jam la oka internacia vegetara kongreso montras, ke la sepa kongreso jetus fruktoportan semon.

Vegetara nutraĵo kiel fundamenta konsistaĵo en la racia organizo de la hejma mastrumo.

Parolado de Fraŭlino Eleonora Paulová-Růžičková,
Dušniky apud Prago.

Kiam la Scienca Konsilantaro de la Akademio de Laboro Masaryk starigis 1928, en literatura konkurso, la tre belan kaj tre aktualan devizon „Racia organizo de la hejma mastrumo“, estis antaŭ ĉio necese respondi kelkajn demandojn:

1. Kio estas hejma mastrumo?

Hejma mastrumo estas higiena, ekonomia, morala kaj sociala aranĝo de kolektivo de evoluiĝanta familio, kiu formas la elementon de la homsocia individuo.

La fizika kaj psika konstitucio de la infano estas senpere dependa de la kvalito de ĝia deveniganto kaj de la zorgo dediĉata al ĝi ekde ĝia naskiĝo, por ke bonaj gentaj kvalitoj estu konservataj kaj disvolvataj. Vera kulturo estas ebla nur en socio, kiu estas bone naskita (eŭgenika) kaj bone edukita (eŭbiotika).

2. Kio estas racia organizo de la hejma mastrumo?

Racia organizo de la hejma mastrumo estas klarvida, zorga ekonomia laboro kun logika motivo,

bazanta sur interna kontinueco,

celanta atingi pli altan mision, tio estas certigon de normala evoluo, certigon de korpa kaj spirita sano.

3. Pro tio do estas neeble organizi la laboron kiel faris la Usonaninoj; sed estas necese organizi la celon.

Racia organizo de la hejma mastrumo estas ebla nur sur bazo de scienca ideologio, kaj tiun prezentas la eŭbiotiko*), scienca etiko pri ĝusta vivordo, vivo harmonianta kun naturaj leĝoj.

Eŭbiotika hejmo estas la ĝusta racia organizo de la mastrumo; ĝi estas jena racia organizo, en kiu ne okazas mekanikigo de la homa spirito, sed en kiu temas pri morala rilato de la familio al laboro. La eterne kreanta homa spirito amanta liberecon restas libera kaj kreanta, tio signifas, ke restas ĝia sento, morala rilato al ĝia laboro, ĝia intereso, ĝia amo al la afero. La naturo kaj ĝiaj eternaj leĝoj estas la gvidantoj.

Se la virino devas organizi sian mastrumon racie, tiam ŝi devas antaŭ ĉio konsciiĝi pri la misio de la mastrumo. Kaj ĝi havas altan taskon: ĉe normala konstitucio ĝi devas sekurigi normalan evoluon korpan kaj spiritan, relative sen malsanoj; tio signifas, ke ĝi estas rezultiganta sanon de siaj membroj kaj sanan disvolviĝon de iliaj organismoj.

Tiam ĝi ne povas esti kiu ajn mastrumo, tio ne povas esti mastrumo urba, konstanta restado en kaĝoj, kiajn formas niaj loĝejoj, kun nutraĵo plejparte vianda kaj kuirita; tio povas esti nur mastrumo nepre eŭbiotika: libera restado en aero kaj suna brilo, kaj nutraĵo plejparte vegetara, laŭeble nepreparita.

La rimedoj de tiu ĉi racia organizo de la mastrumo, kiuj estas ĉe normala konstitucio kondiĉo de normala

evoluo korpa kaj spirita kaj de disvolviĝo de individuaj kapabloj, estas jenaj: bonorda propra nesto — laŭcela kaj bongusta dometo, aŭ propra por sia uzado, aŭ luata por pli longa tempo, libera terpeco ĉirkaŭ la domo, granda 1.500 m² ĝis 2.000 m², por libera restado en aero kaj suna brilo, kaj por tio, ke la familianoj per propra laboro ekspluatu la teron por vegetara nutraĵaro senkondiĉe necesa por ĝusta funkciado de la organismo.

En Ĉeĥoslovakujo, ekzemple, necesus entute 6.000 km² da tera areo por 3 milionoj da tiaj mastrumoj, se oni kalkulas 2.000 m² por unu familio. Konsiderante la tutan surfaceton de nia respubliko de preskaŭ 141.000 km², tio estas relative negranda areo uzota grandparte por fabrikado de nutraĵoj por tiuj familioj kaj krome ebliganta konsumon de ĉiuj forfalaĵoj por fabrikado de nutraĵoj pli racian ol estas la nuna tipo de l' urba loĝado.

Estas certe tasko de laborantoj, ke la tuta nacio estu bone revigligata, por ke ĝi disvolviĝu, por ke la normala kolektivo de internaj kapabloj — kiun la biologoj nomas normala konstitucio — disvolviĝu normale, relative sen malsanoj, sed ne patologie kun ŝarĝo da malsanoj korpaj kaj spiritaj kiel ĝis nun. Nek la industrio, nek agrikulturo ekzistas por si mem, sed havas kiel celon tiun tufthomaran taskon komunan.

Birdido flugas de sur la arbo en la sinon de l' patrino-tero kaj prenas tie ĉi tiun ĝuste konvenan nutraĵon, kiun postulas ĝia organismo helpe de ĝia sana instinkto. Kapro sur paŝtejo, vulpo en arbaro, fiŝo en akvo kaj vermo en la tero elektas por si manĝon ne laŭ franda emo, sed laŭ reala, grave motivita bezono de sia organismo. Tial ni ne trovas malsanajn animalojn en la naturo, kaj se ni ilin volas konservi sanaj en la mallibero, ni aranĝas iliajn vivkondiĉojn konformaj al ilia vivo en la naturo. Sed la homa ido, kiu volus same kiel la birdo kun ĝoja pepado kolekti fruktojn de l' patrino-tero, estas tute forŝirita de ĝi kaj malĝoje vivaĉas ne vekinte ĝis nun eĉ nur tiom da atento rilate la certigon de normala evoluo, kiel kulturataj ĉevaloj, kulturataj hundoj, kulturataj porkoj.

El kio konsistas la esenco de eŭbiotika aranĝo de l' vivo?

Ĉiu familio havas sian propran terpecon, sur kiu ĝi vivas duone agrikulturan manieron de l' vivo; tio estas, ĝi dediĉas sian vivon krom al la patra, speciala, kelkhora profesio mongajna, la reston de l' tempo al la familio kaj al sia hejma mastrumo, al sia peco da tero.

Per tio la familio certigas la ĝustan fundamenton por sia vivo A) fizika, B) spirita-morala, C) sociala.

A) La fundamento de vivo fizika:

1. **Nutraĵo suliĉa:** certigita per propra (hejma) pretigo; ĝusta: 1. nepreparita,
2. ĉefe vegetara kaj plejparte kruda,
3. simpla, nerafinita, tiel ke la gusta organismo direktas senerare la bezonatan kvanton.

Ĉe tio oni eluzos ĉiun forfalaĵon en la hejma mastrumado por la refabrikado de nutraĵoj (per natura cirkul-

*) Profesoro D-ro Stanislav Růžička: System hygieny na základe eubiotiky (sistemo de higieno sur bazo de eŭbiotiko), Bratislavo.

ado de materioj). — Tial fariĝas kanalizado senbezona en tiu ĉi vivmaniero.

2. La korpo ĝuas neeviteble ĉiurilatan funkciadon de ĉiuj organoj, precipe ankaŭ lairegulan perlaboron de la tuta muskolaro.

3. La korpo ĝuas la necesan efikon de normalaj atmosferaj influoj (de l' suno kaj libera aero).

B) Por la spirita parto de la homo per tio efektiviĝas la konstanta rilato kun la Eterna kaj Viva en la naturo, kio estas neevitebla por la sano de la homa spirito.

C) Sociale: La fundamenta elemento de natura socia ordo, la familio, stariĝas sur firman bazon kaj fizikan kaj spirita-moralan, kaj socialan. Nur kaj sole sur tiaj, firme fonditaj eŭbiotikaj familioj estas eble konstrui naturan, fiziologian socialan ordon kaj per tio fondi trankvilan evoluon de l' homa socio.

La manko de tiu ĉi neevitebla sola ĝusta fundamento, la fizike, spirite-morale kaj sociale firme staranta familio eŭbiotika, estas ĝuste la fundamenta kaŭzo de la ĝisnuna malsukcesado en provoj pri tia ĝusta ordo sociala, kiu garantius trankvilan disvolviĝon de l' homa socio.

La ĝisnuna kuracista scienco faris plej fatalan eraron

konatan tra la tuta historio de l' homo, per tio, ke ĝi maltrafis la fundamentan principon, kiu garantias, ĉe normala konstitucio, normalan disvolviĝon kaj normalan funkciadon — relative sen malsanoj — de la homa organismo, tio estas, ĝi preteratentis la naturan fiziologian organizon de l' ekstera parto de la homa vivo, do la naturan fiziologian organizon de loĝado kaj la naturan fiziologian organizon de l' nutrado; kaj la forgeso de tiu ĉi principo, malatento de natura fiziologia organizo de la ekstera parto de l' homa vivo, fariĝas kune kulpa pri tio, ke la homaro evoluas nenormale, abnorme, patologie, kun ĉiam plimultiĝantaj malsanoj korpaj kaj spiritaj; kaj de tio ankaŭ dependas la skismo morala kaj socia.

La teknika scienco ĝuste apogas sin je la fundamenta principo, kiu estas kondiĉo por la ĝusta funkciado de la maŝino: ĝi apogas sin je ĝusta organizo de la ekstera parto: plej taŭga materialo kaj plej ĝusta priservado; per tio ĝi antaŭe sekurigas sin kontraŭ malsanoj — difektoj de l' maŝinaro, por certigi la plej kompletan funkcikapablaron. Alivorte, la teknika scienco per siaj preventivaj aranĝoj antaŭe igis rezulti plej altan laborkapablon kaj ne la konstantan riparadon je la ekstera parto de la tro malfortigitaj maŝinoj.

(Fino sekvos.)

Raporto de la sekretario Oluf Egerod dum la Sepa Internacia Vegetara Kongreso.

Gesinjoroj, karaj kunlaborantoj!

Mia unua diro koncernos nian fidelan amikon, Profesoron Hugo Nolthenius el Holando. Li ne estas plu inter ni. Homo povas morti; sed, kiel ajn vi pensas pri vivo kaj morto, io ĉiam restos ĉi tie post vi: la memoro pri viaj feroj, la ideoj, kiujn vi progresigis, kaj la pensoj, al kiuj vi donis konkretan formon. Konstruaĵo restos post vi. Granda aŭ malgranda. Parto de vi mem, ĉizita de vi, per viaj agoj.

Fermu dum momento viajn okulojn kaj rigardu la vivon de nia nestoro (plejaĝulo), kaj vi vidos konstruaĵon faritan el belemo, kuraĝo, klareco kaj altruismo. Li estis viro, kiu amis la belon. Li amis la muzikon. Iri kun li al opero de Wagner, estis eksterordinara ĝuo. Estis, kvazaŭ li kaj la muziko estas kunfanditaj. Kiam iufoje ni kune aŭdis ordinarajn muzikaĵojn, danmuzikon ktp., li vokis: Jen sonoj, kiuj malbonodoras!

Li estis energia viro. Kvankam li naskiĝis lamulo, li vivis kaj agadis, kvazaŭ li havas harmonian korpon. Ĉu vi vidis lin, maljunulon, kiam li supreniris la ŝtuparon de la subtera fervojo en Londono?

Mi mem konis lin nur kiel maljunulon, kaj en mia arkivo mi havas amason da leteroj de li koncerne je tio, kio ligis nin kaj kio hodiaŭ unuigas nin ĉi tie. Li estis modelo de malegoisto. Pro tio ni tiom honoras lin. Li estis unu el la plej eminentaj viroj en nia armeo. Dum 38 jaroj li estis strikta vegetarano. Li donis sian vivtempon por nia movado, tiel ke ni, liaj kunlaborintoj, elektis lin por dek-sep jaroj kiel nian prezidanton. Meze en sia agado li mortis kiel heroo en nia internacia movado, honorata de ĉiuj saĝaj personoj kaj de ĉiuj anoj de nia movado. La amiko Nolthenius mortis. Kaj tamen li vivas; li ĉeestas en ĉi tiu kongreso, ĉar ĉi tiu kongreso estas parto de lia agado. Honoron al lia memoro! Ni sendos de nia kunsido telegramon al lia funebranta vidvino, kies grandan perdon ni partoprenas, kies doloregon ni sentas, ĉar ĝi estas ankaŭ nia doloro.

Nun mi mallonge raportos en la nomo de la mortinto, nia estimata prezidinto, kaj en la nomo de mia propra sekretario pri nia agado post la Londona kongreso.

Unue ni reiru al la feliĉaj pentekostaj tagoj de la jaro 1926-a, kiujn ni travivis en Londono, kaj kore danku niajn britajn amikojn kaj iliajn du tiom modele laborantajn societojn pro la granda gastamo ĝuita dum tiu bonege organizita kongreso.

Pri la pasintaj tri jaroj ne estas necese diri multon, ĉar la rezulto de la laboro montriĝas en ĉi tiu kongreso, kiam ni ĝuas inter niaj sudetgermanaj samcelanoj. Jen la antaŭhistorio de ĉi tiu kongreso:

Rigardante la sukcesojn de nia organizo en Stokholmo kaj Londono, mi ekhavis la ideon (pri kiu mi persone havas la plenan respondecon), ke estus bone, kunveni en malgranda urbo kie ni pli maldise kunvivus kaj pli multe en kontakto kun la naturo, ol en la bruo de urbego. Unue ni devis vidi, ĉu la famo pri usona milionulo estas vera, kiu laŭdire invitis nin, veturi je liaj kostoj al Ameriko. Sed ni ne trovis tiun milionulon, kaj ni estis (ja bedaŭrata Nolthenius kaj mi) sen prezidanto, sen gastiganta organizo en la postmilita Eŭropo. Tial ni interkonsentis pri tio, ke ni ne povos denove atendi tiom da gastamo, kiel dum la pasintaj kongresoj; ĉar alimaniere ni ne trovus ejon sur la kontinento por nia kongreso. Unue ni provis, ricevi inviton. Neniu respondo! Tiam ni mem provis inviti nin ien. Unue al Hispanujo; sed niaj hispanaj amikoj devis rifuzi. Tiam mi korespondis kun De Clercq en Nederlando. Li bedaŭris kaj donis motivojn pro la manko de invito. Tiam ni demandis D-ron Schläger pri Wilhelmshöhe. Poste ni pensis pri Hamburgo, pri Dresdeno; sed la postmilita Germanujo ne kapablis, preni la kongreson sur sin. Mi mem iris al Dresdeno kaj al Bohemujo. Mi partoprenis en kunesto sur la monto Lausche kaj trovis, ke inter la sudetgermanaj samcelanoj ni trovos ejon por nia kongreso. Ni havis konferencon kun la samcelanoj Förster, Schnitzer, Dürr kaj Feix, kaj kiam en aŭgusto 1927-a mi revenis el Centra Eŭropo, mi jam havis bonajn esperojn. En junio 1928-a mi ricevis invitleteron de la amiko Feix.

Mi korege dankas la invitintan organizon, nome la Sudetgermanan Asocion de Unuiĝoj por laŭnaturo Vivo

kaj Kuracado en la Ĉeĥoslovaka Respubliko, pro ilia gastamo kaj pro ilia kuraĝo, organizi ĉi tiun kongreson. Specialan dankon al la organizinta sekretariejo, kiu faris grandegan laboron!

En septembro 1928-a mi renkontiĝis kun la amikoj Nolthenius, Bünemann kaj Feix en Kolonjo, kaj ni havis longajn preparolojn pri ĉiuj detaloj de nia kongreso. Amikon Bünemann mi invitis por tiu preparolo pro tio, ke li redaktas nian internacian „Vegetarano“. Ni devas danki lin pro la helpo donita al nia organizo per la dissendo de niaj sciigoj al ĉiuj amikoj indikitaj al li. Mi mem skribis proksimume 500 leterojn pri la organizo de la kongreso. Sur ĉiu tiu kampo, kompreneble, restos ankoraŭ multo farota, kaj ni supozeble revenos al la temo, kiam ni estos aŭskultintaj la raportojn de la diversaj societoj.

Nun pri la regularo. Oni proponis ŝanĝojn. La komitato preparolis ilin kaj faros taŭgajn proponojn, kiam ni atingos ĉi tiun punkton.

Vegetarismo rilate je Tutmonda Frateco.

Parolado de pastro Walter Wash dum la 7-a internacia vegetara kongreso.

Eble, por la enkonduko, persona klarigo estos oportuna. Kun ĉiu respekto kontraŭ ĉia religia formo, kiu estas reprezentata ĉi tie kaj ankaŭ kontraŭ tiuj, kiuj ne konfesas ian konatan formon de religio, (mi ilin ĉiujn salutas) mi petas permeson konstati, ke mi estas ligita kun la Libera Religia Movado en Grandbritujo, movado, kiu sin mem karakterizas kiel movado al Frateco Tutmonda. Ĝi celas unuigi la diversajn religiojn de la mondo kun la intenco trovi la rimedojn, por efektiviĝi Tutmondan Fratecon kaj kune kun ĝi Tutmondan Pacon. Ĝi estas religia movado; sed ĝi estas **libereca** movado. Ĝi ne ŝarĝas per iu sindevigo la spiriton kaj la konsciencon de tiuj, kiuj aliĝas al ĝi. Pro tio kun speciala kontenteco mi akceptas la inviton de ĉi tiu kongreso, por paroli pri la rilatoj inter la Nutrajreformiga Movado kaj la Tutmonda Frateco.

La potenca religia anarkisto Leono Tolstoj skribis libreton kun la titolo „La Unua Paŝo“. Tie li argumentis, ke la akcepto de senvianda dieto, de dieto sen mortigo, de dieto por kompato, estas la unua paŝo al la efektiviĝo de paco kaj frateco inter personoj kaj inter la nacioj de la tero.

Ni ĉi tie kunvenis kiel la amikoj de ĉiuj popoloj, kaj ni ĉiuj suferis pro la kruelaĵoj kaj mizeroj de la milito. Tial, kiel internacia kunsido de homoj, ni konsentis, ke la ĉefa afero, kiu indas esti pritraktata hodiaŭ, estas la progresigo de Tutmonda Frateco. Por atingi tion, ĉiuj fortoj kaj ĉiuj influoj devas unuigi. Se tio ne okazos, la homaro estas kondamnata por pereji per sia propra buĉadmaŝinaro.

Antaŭ ne tre longa tempo la religio estis ankoraŭ ligita al dogmo de infera fajro por la brulado de nekredantoj. Kiam mi estis knabo, mi aŭdis ankoraŭ, ke strataj predikantoj en mia hejmlando Skotujo vokis sian devizon al la pasantoj: „Konvertiĝu aŭ brulu!“ (Turn or burn). Ili opiniis, ke la homoj devas aŭ konvertiĝi al ilia religio aŭ bruladi en la infera fajro. Tio ne estas mia ideo pri religio. Sed mia decida konvinko estas, ke la diversaj nacioj de la homaro devas aŭ unuigi en paca kunlaboro

Rememorante nian trijaran laboron, mi devas speciale akcenti tri punktojn. Unue, jen la demando pri la lingvo. Ĉu ni povas solvi ĝin, aŭ ĉu ni havos malgrandan Babelon? Kion vi opinias? Kiel ni parolos dum la kongresoj? Nur en du lingvoj la bultenoj?

Ĉu la radio sin proponos al niaj parolantoj en ĉi tiuj tagoj? Niaj rusaj amikoj proponis, krei internacian propagandan filmon pri vegetarismo. Ĉu ni provu?

Niaj nederlandaj amikoj deziras presitan raporton pri la Olimpaj Ludoj. Bela ideo! Ĉu ne estus progresigo por nia movado, se ni havus Internacian Oficejon, kie ĉiuj vegetaraj revuoj centriĝas kaj ĉiuj informoj pri la movado estas kolektataj?

Eble, antaŭ ol nia diskuto finiĝos, mi havos okazon por pluaj sciigoj. Antaŭ ol fini, mi volas prezenti la bilancon de la I. V. U., kiu mi kompletigis laŭ la ebleco pere de la korespondado kun s-ro Nolthenius kaj lia edzino.

Mi dankas vin pro la fido montrita al mi kaj remetis mian oficon en viajn manojn.

aŭ pereji en la sekvanta milito. Nia devizo estas: „Unuigi aŭ pereu!“.

Ni ĉiuj scias, ke la homa naturo enhavas kelkajn strangajn kontraŭdirojn. Sed nenia kontraŭdiro estas pli stranga, ol tio: ke la homo samtempe estas la plej genia konstruanto kaj la plej malica detruanto. Per la dekstra mano li konstruadas, kaj per la maldekstra li detruas tion kion li konstruis. La homo parolas fiere pri la „pli malaltaj“, la viandmanĝantaj bestoj; sed samtempe li englutas pli da viando ol ĉiuj sovaĝaj bestoj kaj marmonstroj kune. La homo estas senkompare la plej karnivora (viandmanĝanta) el ĉiuj estaĵoj ĝis nun evoluintaj, kaj samtempe li estas la plej idealema kaj progresema. Tion vastaj estas la altaĵoj kaj la malaltaĵoj de la homa estado, ke teorio pri Dio kaj Diabolo eĉ ne sufiĉas, por esprimi ilin. La plej granda el ĉiuj etikaj problemoj estas: Kiel eduki la pli malaltan naturon de la homo, levante liajn pli altajn impulsojn por evoluo kaj agemo. Se ni estas fervoraj pri la nutrajreformigo, tio estas, ĉar ni kredas, ke kompatdieto estas el ĉiuj rimedoj la plej simpla por la plej dezirinda el ĉiuj celoj. Multaj aliaj reformoj helpas; sed ĉi tiu estas „baza“. Ĝi estas „la unua paŝo“.

Multaj boneguloj bedaŭras la suferadon de sentemaj estaĵoj sur nia planedo, ne vidante, ke ili mem estas morale respondecaj por la plej granda parto el tiuj suferegoj. Ili rifuzas, agnoski la rajtojn de bestoj aŭ fari sian devon kontraŭ ili. Ili konservas la barbaran dieton de malpli civilizitaj epokoj, kvankam ili samtempe murmuris la funebnan diron de antikva apostolo: Ke la tuta estaĵaro ĝemadas kaj laboradas en doloro; sed tute ignoras la daŭrigon de la sentenco: Ke la estaĵaro daŭrigos tiun ĝemadon kaj laboradon, ĝis kiam la Filoj de Dio manifestiĝas, tio signifas, ĝis kiam konsciigintaj kaj humanaj viroj kaj virinoj ekstaras, por ĉesigi kruelajn kutimojn en la propra praktikado, kaj klopodas, por forbalai la kruelecon de la tero.

Pensu dum momento pri niaj amikoj, la trinkreformuloj. Ili estas konvinkitaj, ke la moderaj trinkantoj estas pli granda malhelpo kontraŭ la alkoholmalpermeso ol la

veraj drinkuloj. Iom simile mi kelkfoje pensas, ke la tiel-nomataj „bonaj“ personoj portas pli da respondeco ol la tiel-nomataj „malbonuloj“ pri la ĉiutagaj krimoj kontraŭ la senkulpaj estaĵoj abomene mortigataj por la kontentigo de malsana homa apetito. Se tiuj bonvolemaj personoj nur povus rigardi la agoniojn ligitajn kun la bredado, traktado, fervoja transporto, ŝiptransporto, pelado kaj buĉado de la sendefendaj viktimoj de homa glutemo, ili sentus abomenon kontraŭ la sanga manĝaĵo, kiun ili nun tiom frademe prenas el siaj teleroj.

Nia vidkapablo iras pli malproksimen. Repensu pri tiu granda libro „La rajtoj de la homo“ verkita de Thomas Paine. Ĉu ne ekzistas interligo inter la rajtoj de la homo kaj tiuj de la bestoj? Ni estas konvinkitaj, ke jes. Ni estas konvinkitaj, ke homaj rajtoj ne estos plene konsentataj al homoj, dum kiam oni rifuzas al la bestoj iliajn rajtojn. Ni vidas vivan interligon inter la nehumaneco kontraŭ la besto kaj tiu nehumaneco kontraŭ la homo, kiu — kiel diris la skota poeto — igas senombrajn milojn da personoj malĝoĝi.

Pli ol ĉiujn aliajn homojn, ni honoras tiujn, kiuj (kiel Budho en la oriento) fondis sensangan altaron kaj sekvigis ĝin de sensanga manĝotablo. Ni, en la okcidento, adoptis la sensangan altaron, kaj kiam ni estos adoptintaj ankaŭ la sensangan tablon, ni ne plu toleros tiujn sangajn batakampojn, kiuj estas la neo de interhoma frateco, batakampojn, kie unu homo praktikas kontraŭ sia homfrato tiajn ferocajojn (kruelaĵoj), kiajn ĉiuj monstroj de la tero kune de la plej antikvaj tempoj ĝis nun neniam praktikis unu kontraŭ la alia aŭ kontraŭ sia persekutisto, la homo. Se ne troviĝus en nia mezo buĉejoj por nia bestofrato, tiam ne estus povintaj troviĝi buĉejoj por nia homfrato en Flandrujo kaj aliloke. La leĝo estas skribita: „Kion ajn homoj kaj nacioj semas, tion, kaj nenion alian, ili ankaŭ rikoltos“. Kion ajn ili semas en la buĉejoj de Londono aŭ Prago, tion ili ankaŭ rikoltos en la homoferejoj de Mons kaj Galipolio. Trafe diris nia poeto, Aleksandro Pope:

La deliro de la pasioj komenciĝis per tiu sango kaj jetis kontraŭ la homoj pli ferocan sovaĝulon: la homoj.

Ankoraŭ io. Pensu pri Arturo Schopenhauer, la filozofo de la kompato. Moderna vegetarismo havas siajn radikojn en tiu plej alta virto de kompato, kiun Schopenhauer akcentis kun tiom malĝoja sincereco. Antaŭ ne longe brita ĵurnalisto diris, ke la vegetaranoj donas tro multe da argumentoj por sia kredo kaj praktiko. Se ili limiĝus je unu sola argumentspeco, li diris, ili farus pli rapidan progreson. Diru simple al la personoj, ke ili sentus sin pli viglaj kaj pli energiaj, kaj ili aliĝus al la movado! Mi ne povas perdi tempon, por diskuti pri tia senkolora utilismo. Se la diro estas vera, ĝi estas nur la plej malgranda parto de la vero. Mankas al ĝi la morala bazo de nia movado, kaj ĝi absolute ignoras la humanajn principojn, kiuj gvidas nin. Neniu klarigis tiun etikan bazon pli konvinke ol la filozofo, kiu faris el la kompato aŭ kunsento la ĉefan fonton de morala agado. „Kunsento senlima, kiu unuigas nin kun ĉiuj vivaj estaĵoj, jen la plej solida, la plej certa garantio de moraleco. . . . Kiu ajn posedas ĝin, tiu estos tute nekapabla kaŭzi malĝojon aŭ perdon al iu ajn, esti atakema kontraŭ iu ajn, fari malbonon laŭ iu ajn direkto. . . . Ĉiu lia agado portos la signon de justemo kaj amo.“ Post tio la verkisto klarigas, ke la ideo, ke ni havas nenian devon kontraŭ la bestoj, estas ideo „ribeliga, stulta kaj barbara“. La fama samnaciiano de Schopenhauer, D-ro David Strausz, daŭrigis la akuzon: „La maniero, laŭ kiu popolo entute traktas la aliajn kreitaĵojn, estas unu ĉefa mezurilo por ĝia ci-

vilizeco. . . . La historio pri la krimoj montras al ni kiom multaj homturmentantoj kaj murdantoj unue estis turmentantoj de la bestoj. . . . La budhismo laŭ tiu direkto efikis pli multe ol la kristanismo, kaj Schopenhauer pli multe ol ĉiuj antikvaj kaj modernaj filozofoj kune.“

Eble Strausz estis iom tro supra en sia komparo inter Schopenhauer kaj antikvaj filozofoj. Prenu ekzemple Pitagoron, kiu predikis en la sesa jarcento antaŭ la kristana epoko. Pitagoro, la Samosano, povas esti konsiderata kiel la fondinto de okcidenta humanitarismo. Li praktikis sindeteno de la viando de vivantaj bestoj pro tio, ke tia sindeteno kondukis al pacema spirito, al raciemo kaj al frateco inter individuoj kaj popoloj. Speciale li rekomendis, ke leĝdonantoj kaj politikistoj ne manĝu viandon, argumentante, ke ili ne povas postuli justecon de aliaj, kiam ili mem estas kruelaj, maljustaj kaj glutemaj kontraŭ estaĵoj tiom intime ligitaj al ili laŭ nature. Ĉar, li daŭrigis, „bestoj kaj homoj havas la saman komunan vivon; devus do ekzisti inter ili simpatio kaj la agnosko de frateca ligiteco“.

Iom poste ni trovas Platonon, kiu predikas similan instruon, kvankam ne kun la sama emfazo. En sia verko „Respubliko“, kiu efektive estas libro pri justeco, li akcentas, ke ideala ŝtato devus esti regata de viroj edukitaj kaj ekzercigitaj en ĝustaj dietaj principoj, pri kiuj eĉ la granda popolamaso ne devus esti lasata senscia.

Inter la antikvuloj, tamen, Gaŭtamo, poste nomata „La Budho“, estas honorinda kiel la plej alta amiko kaj savinto de la bestaro; ĉar li instruis kaj per ekzemplo fortigis la virton de la kunsento, per tiom konvinkaj kaj ĉarmaj diroj, ke ĝis nun multaj el niaj fratoj en la oriento faras el la kompato (kunsento) sian plej religian vivregulon. Per unu sola altspirita ago Gaŭtamo forigis samtempe la sangajn altaron kaj la sangajn manĝotablon kaj tiel faris pli multe por la paco kaj frateco ol ĉiuj aliaj antikvuloj kune.

En sia nobla poemo „La Lumo de Azio“, Edward Arnold priskribas, kiel Gaŭtamo riproĉis la oferantajn pastrojn de sia epoko. La viando de nia bestofrato estis taŭga nutraĵo nek por dioj nek por homoj. Belega estis la preĝo, per kiu la antikvaj Hindoj kutimis fini siajn publikajn prezentaĵojn: „Ĉio, kio havas vivon, estu liberigata el sufero!“

Nia kunsento ne estas religia kunsido, kaj ne taŭgas diskuti ĉi tie religiajn demandojn; sed ĉiuokaze dum internacia kunsido de vegetaranoj ni rajtas citi la ĉefan kaŭzon, pro kiu la kristanoj vane klopodas influi la Hindojn, la budhistojn kaj, okaze, la mahometanojn. Jam ĉe la komenco de moderna misia laboro la franca deisto, Voltaire, akcentis ĉi tiun kaŭzon, kiu ĉiam validas kaj pruvas, ke Voltaire estis prava. La vegetaraj Hindoj konsterniĝas pro la kristana misiisto, kiu englutas bestan viandon kaj speciale la viandon de la sankta bovino, la simbolo de la Naturo kiel Ĉion-Nutranta Patrino, kaj li malfacile akceptas formon de religio, kiu tiom forte kontrastas kontraŭ liaj naturaj instinktoj. Li povus fariĝi kristano, sed, ho, neniam viandmanĝanto! La abstinemaj mahometanoj vidas, ke la kristanoj absorbas la fermentintajn trinkaĵojn malpermesitajn de ilia profeto. La pacemaj budhistoj vidas la furiozajn militojn, kiujn okazigas kristanaj nacioj unu kontraŭ la alia. Tiel, ĉu ili manĝas, ĉu ili trinkas, ĉu ili batalas; la religio de la okcidento malproksimiĝis de la oriento, kie ĝi naskiĝis. La mensoj de la plej multnombraj orientaj popoloj estas fermitaj kontraŭ religio, kiu eĉ kelkfoje el la viandmanĝado faris pruvilon pri ortodokseco, ekzemple dum la persekutado al la Albianoj, kaj kiu sankciis militojn malgraŭ sia frat-

iga instruo, ke la kreinto kreis el unu sango ĉiujn popolojn sur la tero. Sed la scienco instruas al ni, ke la subhomaj rasoj havas saman sangon, kian havas la homaj rasoj; tial ankaŭ ili havas rajton je spaco sur la tero. Kristana poeto, Alfred Tennyson, insistis, ke liaj samreligiuloj „moviĝu supren, superante la beston, kaj ekstermu la simion kaj la tigron“ en siaj koroj. Sed la samreligiuloj de la poeto persistis en siaj glutemaj kutimoj, ĝis kiam la ribelema spirito de D-ro Anna Kingsford akuzis la kristanecon, ĉar ĝi estas „tre simila al grandega buĉejo kaj turmentejo“. Vi certe ne miskomprenos min. Mi ne volas ŝeti ŝtonojn sur iun specialan formon de religio. Ĉi tiu internacia kunsido malatentas pri sektoj kaj kredoj. Sed la kristanoj devas esti avertataj, ke, se ilia religio devas korespondi al la postulo, ke ĝi konduku la homaron laŭ la vojo de kompato kaj paco, la anoj devas (mi uzas la parolmanieron de ilia propra sankta libro) krucumi sian propran karnon kaj ne tiun de siaj kvarpiedaj gefratoj. Krucumi ili devas sian karnon kun ĝiaj voluptoj kaj frandemoj; jen la necesa unua paŝo al tiu epoko de universala amo kaj paco, kiu estis la revo de la plej noblaj kristanoj. Iu trafe diris: Ni devas humanigi la koron de la kristanaro. Tio farita, ĉio farita.

Certe la plibonigo de la homa karaktero estas la alta celo de ĉia religio kaj ĉia etiko, kaj ni ne povas esperi iun esencan pliboniĝon, dum kiam civilizitaj popoloj daŭre mortigas por manĝi kaj kaŭzas mizerigon kaj humiligon al bestoj kaj homoj per la komerco kaj transporto de besta viando.

Eterna estas la diferenco, ĉu la homoj praktikas Kulton de Vivo aŭ Kulton de Morto. La pruvoj pri la malbona efiko de la sangodieto al la homa karaktero estas pli ol konvinkaj. La mortigo kaj engluto de bestoj estas sovaĝa kutimo kaj favoras sovaĝecon en sango kaj menso.

Sed la krueleco kaj malnobleco de duonkanibalismo ne konsistas nur el la mortigo kaj viandmanĝado. La tuta sistemo estas abomena por homa menso ne malmoligita per kutimo aŭ ne senigita je imago- kaj pensokapablo. Ĉio ligita kun la bestbredado por homa nutraĵo, kun la traktado de bestoj, ilia transporto al la vendejoj per fervojo, ŝipoj aŭ laŭ la ŝoseoj, kaj fine la buĉado en la teruraj kondiĉoj de Ĉikagaj aŭ pli malgrandaj buĉejoj, ĉio detruas homan sentemon, malnobligas la homan naturon, krudigas nin, malmoligas la korojn kaj metas nian moralan nivelon sub tiun de la viktimoj de nia senpripensito kaj glutemo. Religio neniam povas esti tiu pura kaj bela afero, kiu ĝi devus esti, tiom longe, kiam ĝi favoras la malnobliĝon de la homa karaktero, tiom longe, kiam ĝi lokigas la stomakon super la animon. Vane la religio proklamas la diecon de la homo, dum kiam ĝi protektas kutimon kaj komercon, kiun Edward Maitland trafe nomis „la diabliĝo de la raso“. Temas pri la sorto de la estonta raso. Ni staras antaŭ la elekto inter du klare distingeblaj tipoj de homa karaktero, inter du kontrastaj idealoj de homa konduto.

Ĉu la kristanaj popoloj fine sekvos la principojn de mildeco kaj kompatemo postulitaj de tiu, kiun ili nomas Majstro (kvankam ili ne faras tion, kion li ordonis), aŭ ĉu ili per sia sanga dieto persistas kulturante tiujn karakterajn ecojn, kiuj kondukas rekte al la batalejoj kaj faras mokegon el la homa frateco? Jen la esenca vivdemando. La vegetarismo estas la respondo en ĉi tiu kongreso.

Mi ne forgesas, ke ekzistas multaj personoj, kiuj ne apartenas al la kristanaro, kaj ni nutrajreformantoj turnas nin al ili per la samaj motivoj. Mi pensas pri etikuloj, racionalistoj, liberpensuloj kaj la multnombraj religiaj he-

terodoksuloj. Estas certe tre grave, ke ili decidu, kiajn ecojn ili deziras kulturi en si mem kaj en siaj infanoj. Neniu povas nei, ke la viandmanĝado, kun ĉiuj siaj abomenaj akompanaĵoj, tendencas ne nur malheligi la intelekton, sed ankaŭ mortigi la animon. Maldelikata vivado, kiel jam diris Porfirio, estas la detruo al ĉiu vivo pli alta, dum ke (kiel diris Seneko) sindeteni de la besta viando signifas kuraĝigi kaj kulturi senkulpecon. La praktikado de kompato per ĉiutaga dieto de kompato kuraĝigas kompateman tendencon de la spirito, kiu kristaliĝos en kompateman karakteron, kaj ĉi tiu siaflanke kondukas al universala amo, kiu ĉirkaŭprenas ĉiujn rasojn kaj naciojn sub la signo de frateco. El pli delikataj kutimoj naskiĝas pli alta moralo, ĝis kiam ni plenumos la harmonion de ĉiuj religioj, la federigon de ĉiuj nacioj kaj la paciĝon de la tuta mondo.

De kie venas militoj kaj masakroj? Mi kuraĝas diri, ke ili ne ĝermas tie, kie dieto de kompato estas praktikata. Voĉo el la kvara jarcento antaŭ la kristana epoko, la voĉo de Diogeno, respondas: „Ne de la grenmanĝantoj venas militoj kaj piratado; sed de la viandmanĝantoj venas tiranoj kaj subpremantoj“.

Konvinkite, ke ni interkonsentas pri la vera celo de socia etiko, konvinkite, ke ni konsentas pri tio, ke tutmonda frateco estas la fina celo de socia kaj internacia klopodado, ni devas nur simple preni decidon, por forlasi la kutimojn kaj ideojn, kiuj prokrastas la progresadon al la celo. Tuthomara unueco povas rezulti nur el la sincera konvinko pri la parenceco inter ĉio viva. En senco pli vasta ol Porfirio ni asertas, ke „kunligo aŭ parenceco estas la bazo de justeco“. Ni aliĝas al la idealo de Howard Moore pri „La Universala Parenceco“. Ni estas civitanoj de la „sola perfekta kaj vera Respubliko de Shelley, kiu ĉirkaŭprenas ĉiun (sendanĝeran) vivantan estaĵon“. La subhomaj rasoj havas sian plenrajtan lokon en la ĉion-ĉirkaŭprenanta respubliko de vivantaj estaĵoj. Tiom longe, kiam ni esceptas ilin el la Regno de l' Amo kaj pelas ilin al la Infero de l' Bestoj, ni neniam povos liberiĝi el batalado, sangverŝado, milito kaj ĉiuj mizeroj, kiuj sekvas el la milito.

La morala kaj religia mondo neniam donis sufiĉe plenan respondon al la demando: Kiu estas mia proksimulo? La granda Hindu, Mahatma Gandhi, donas la altspiritan respondon de la angla liberpensulo Shelley. Li agnoskas ĉiun vivan estaĵon kiel sian proksimumon, ĉiun kun ĝia propra loko en la kosmo, ĉiun kun ĝia aparta funkcio en la universala celo. Sekvante la anglan scienciston Charles Darwin, la angla poeto kaj verkisto Thomas Hardy akcentis, ke la ora kondutregulo (agu kontraŭ aliaj tiel, kiel vi deziras, ke ili agu kontraŭ vi) ĉirkaŭprenas niajn subhomajn parencojn; ĉar ili havas saman sangon kaj estas niaj prauloj kaj prapatroj, kunuloj en la ununura Universala Vivo, per kies granda fluado tra sennombraj periodoj de evoluo la homo, la fiero homo, atingis sian nunan altan nivelon. Li ne senpense englutu la bonfarintojn, kiuj perumis al li la altan donon de vivo-forto.

Se ni volas ĉesigi militojn, se ni volas ĉesigi subpremadon kaj nejustecon, se ni volas ĉesigi sklavecon kaj ekspluatadon, se ni volas venigi la Oran Epokon kaj fari historian veron el la fabelo pri Edeno, ni devas kulturi tiun spiriton de universala kompato kaj justeco, sen kiu la tutmonda frateco restus vana kaj neniam efektivebla revo.